

# LA DOKTRINO DE MEZECO

(La dua el la Kvar Libroj de  
Konfuceismo)

(PROVA TRADUKO)

## 中庸

(儒学经典《四书》之二)

(试译稿)

Esperantigita de Wang Chongfang

王崇芳世译

## ENHAVO

Antaŭparolo 前言

La Teksto de LA DOKTRINO DE MEZECO 《中庸》正文

Apendico: saĝaj vortoj el LA DOKTRINO DE MEZECO 出自《中庸》的经典名句 (已收入拙编《中华汉世语典》)

### PRONONCA ŜLOSILO DE LA PROPRAJ NOMOJ EN NIAJ TRADUKOJ

专有名词中汉语拼音字母读法

La ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la ĉina oficiala sistemo de transskribo povas esti prononcataj proksimume kiel la Esperantaj kun la jenaj esceptoj:

Konsonantoj:

ch = ĉ h = ĥ j = ĝj q = ĉj r = ĵ sh = ŝ w = ŭ x = ŝj y = j zh = ĝ

Kombinoj de vokaloj:

ai = aj ei = ej ao = aŭ ou = oŭ ia = ja ie = je iao = jaŭ iou = joŭ uo = ŭo uai = ŭaj  
uei = ŭej uan = ŭan uang = ŭang weng = ŭeng yu = ju ŭ = ju u post j, q, x = ju

## ANTAŬPAROLO

*La Doktrino de Mezeco* origine estis unu el la artikoloj inkluzivitaj en *La Libro de Ritoj* (礼记), kiu kolektis materialojn koncernantajn la antikvan ritaron, registritajn de la Konfuceanoj. Pri la aŭtoreco de *La Libro de Ritoj*, la ĝenerala opinio estas, ke ĝi estis kompletigita dank' al la kontribuoj de multaj konfuceanoj en la periodo ekde la Militantaj Regnoj (475—221 a.K.) ĝis la dinastio Han (206 a.K.—220 p.K.) sur la bazo de ilia kolektado de perditaj artikoloj kaj historiaj faktoj de la antaŭaj generacioj, kun la intermeto de iliaj propraj komprenoj kaj interpretoj.

Pri la aŭtoreco de *La Doktrino de Mezeco*, la tradicia opinio estis, ke ĝi estis skribita de Zi Si, la nepo de Konfuceo kaj filozofo dum la Militantaj Regnoj (Zi Si estis lia literatura nomo, lia propra nomo estis Kong Ji). Kaj, laŭ Han Yu, Tang-dinastia literaturisto kaj pensulo, Zi Si estis unu el la disĉiploj de Zeng Shen (曾参), kiu mem estis disĉiplo de Konfuceo, kaj 23 pecoj el liaj verkoj estis inkluzivitaj en la *Katalogoj de Literaturaj ka Artaj Verkoj de la Dinastio Han* (汉书·艺文志), sed ili ĉiuj poste estis perditaj. Tio ĉi montras, ke la aserto, ke Zi Si estis la aŭtoro de *La Doktrino de Mezeco*, estas pli aŭ malpli kredebla. Ka tamen, laŭ iuj frazoj en la nun ekzistanta eldono, kiel ekz. "En la nuna tempo, oni havas la samajn veturilajn ŝpurojn, uzas la samajn ideografiaĵojn kaj sekvas la saman etikan kodon (今天下车同轨, 书同文, 行同伦), kaj "Katastrofo minacas okazi al tiu, kiu estas senscia kaj tamen tromemfida, malaltranga kaj tamen arbitrema, kaj vivas en la nuna mondo kaj tamen persistas en la restarigo de la antikva sistemo" (愚而好自用, 贱而好自专, 生乎今之世, 反古之道。如此者, 灾及其身者也), oni inklinas opinii, ke tiu ĉi versio konsistas el vortoj aldonitaj de postaj kleruloj de la dinastioj Qin kaj Han.

*La Doktrino de Mezeco*, kiu klarigas ĉefe la Konfuceisman etikan vidpunkton koncerne la perfektigon de la personeco, administradon de la regno kaj la manieron konduti en la mondo, liveras gravajn, ampleksajn kaj sistemajn traktaĵojn pri la konfuceisma filozofio. La famaj kleruloj Cheng Hao (程颢) kaj Cheng Yi (程颐) donis grandan gravecon al *La Granda Lernado* kaj *La Doktrino de Mezeco* kaj, metante ilin kaj la aliajn du gravajn konfucsimajn verkojn *Analektoj de Konfuceo* kaj *Mengzio* sur la saman planon, kunigis ilin en la verkaron *La Kvar Libroj*. Zhu Xi, granda filozofo de la dinastio Song, dediĉis sian preskaŭ tutan vivon al la prinotado de *La Kvar Libroj*, kaj la kvar verkoj de li prinotitaj estis kune publikigitaj kiel serio titolita "*Kvar Libroj kun Kolektitaj Komentarioj*" (四书集注).

Koncerne la manieron plialtigi la personan kulturatecon, *La Doktrino de Mezeco* proponas, ke oni "tenu sin for de tiuj, kiuj diras malicajn vortojn pri aliaj", "ĉiam estu diskreta kaj vigle atentema tiam, kiam li estas for de alies vido, kaj ankaŭ timema kaj singarda tiam, kiam li estas for de alies aŭdo", kaj "neniam malbone konduku eĉ tiam, kiam li estas en privateco, nek malkaŝu malbonajn intencojn eĉ en bagatelaj aferoj", t. e. oni

devas resti singarda precipe tiam, kiam li estas sola. Oni devas esti severa kontraŭ si mem, “se li maltrafas la centron de la celtabulo, li devas sin returni kaj serĉi la kaŭzon de sia malsukceso en si mem”; oni devas diligente studas kaj serioze sekvi la principojn de la lernado “por ion atingi, ili devas vaste studi, detale demandadi, zorge pripensi, klare distingi kaj serioze praktiki”. *La Doktrino de Mezeco* ankaŭ opinias, ke la ekstrema honesteco estas la ŝlosilo por la kulturado de la persona morala karaktero kaj la alproksimiĝo al la ideala stato de la “mezeco”. Ĝi diras: “La sincereco estas la fino kaj la komenco de ĉio; sen la sincereco ekzistus nenio”; “la sincereco estas la virto de la Ĉielo, kaj la atingo de la sincereco estas la virto de la homo”; “la ekstreme sincera povas esti komparata kun la supernaturaj estaĵoj”. Ĝi pluapaŝe montras, ke “per la sincereco li povas perfektigi pli ol sin mem: li povas perfektigi ĉiujn estaĵojn”; “nur la plej sincera homo povas subteni kaj ĝustigi la fundamentajn interhomajn rilatojn, starigi kaj nutri la fundamentan virton de la homaro, kaj koni la disvolviĝon kaj la transformiĝadon de la universo”, kaj “nur la saĝulo, kiu estas la plej sincera, povas disvolvi sian propran naturon ĝis la perfekteco; kiam li kapablas plene disvolvi sian propran naturon, li povas fari la samon al la naturo de la amasoj; kiam li kapablas plene disvolvi la naturon de la amasoj, li povas fari la samon al la naturo de ĉiuj estaĵoj sub la ĉielo; kiam li kapablas plene disvolvi la naturon de ĉiuj estaĵoj sub la ĉielo, li povas helpi al la Ĉielo kaj la Tero kreskigi kaj nutri ĉiujn estaĵojn; kiam li kapablas helpi al la Ĉielo kaj la Tero kreskigi kaj nutri ĉiujn estaĵojn, tiam li povas stari flanko ĉe flanko kun la Ĉielo kaj la Tero”. Kaj tial, la ekstrema sincereco menciita ĉi tie faras homon integra parto de la naturo — ideala stato, kiun oni povus atingi per sia senĉesa konscia penado en sin-plibonigado.

Koncerne la regadon de la regno, *La Doktrino de Mezeco* opinias, ke “la lerteco de la regna regado kuŝas en la akiro de la virtaj kapabluloj, kaj tiaj personoj povas esti akiritaj dank’ al la kulturita karaktero de la reganto; por bone kulturi sin mem, la reganto devas agi laŭ la normoj ĝenerale akceptitaj sub la ĉielo; por agi laŭ la normoj ĝenerale akceptitaj sub la ĉielo, li devas sekvi la principon de la humaneco.” Ĝi diras: “Ĉiuj, kiuj sin okupas je la regado de la imperio kun ĉiuj ĝiaj regnoj kaj familioj, devas sekvi la jenajn naŭ regulojn kiel normojn: plialtigi sian kulturitecon, estimi la virtajn kapablulojn, teni sin proksima al siaj karaj personoj, respekti la ministrojn, montri zorgemon al la regnoficistoj, ami la popolon kiel siajn filojn, vaste varbi metiistojn, praktiki la politikon de mildeco en la landlimaj regionoj, kaj pacigi la feŭdajn dukojn kaj princojn.” La unua kaj la plej grava regulo estas plialtigi sian kulturitecon. La supraj reguloj ĉiuj estis, kompreneble, por tiuj en potenco. Koncerne la ordinaran popolon, oni devis starigi bonajn rilatojn inter la monarko kaj la regatoj, inter la patro kaj la filo, inter la edzo kaj la edzino, inter la fratoj kaj la amikoj; oni devis fari penadon fari sin saĝa, bonkora kaj kuraĝa; oni devis ami lernadon, persisti en bonfarado, havi la hontosenton, scii, kio estas bona, kaj kiel fari studadon.

Koncerne la manieron kondukti en la mondo, *La Doktrino de Mezeco* proponas idealan filozofion pri la vivo — la doktrinon de mezeco. La termino “mezeco” devenas de Konfuceo. La enhavo de la tria ĉapitro de *La Doktrino de Mezeco* estas analoga al la jenaj vortoj en la *Analektoj de Konfuceo*: “Kiel transcenda estas la morala forto de la Ĝusta Mezo! Kaj tamen jam de longe estas malofta ĝia praktikado inter la popolo!” (中庸之为德也，甚至矣乎！民鲜久矣) kaj “transpaso estas same malbona, kiel neatingo” (过犹不及).

Por esti fidela al la principo de la “mezeco”, oni devis “esti kvietema kaj modera sen

sekvi blinde ĝeneralajn opiniojn, krom siajn ĝustajn”, “firme stari sur la mezo sen flankiĝi al la du flankoj”; li devis tiel agi: “Kiam li okupas altan pozicion, li traktas malestime aŭ krude neniun, kiu estas malsupera al li; kiam li okupas malaltan pozicion, li humiliĝas al neniun, kiu estas supera al li”, “li ne estas ordonema tiam, kiam li okupas superan pozicion, kaj ne estas malobeema tiam, kiam li okupas malsuperan pozicion”; li devis “agi konforme al sia rango kaj deziri nenion, kio estas super lia situacio”, “scii resti kontenta pri sia loko, kian ajn pozicion li okupas” kaj “ne plendi kontraŭ la Ĉielo tiam, kiam li levas sian rigardon supren, nek riproĉi homojn tiam, kiam li mallevas la rigardon malsupren”. Li ankaŭ devis “esprimi siajn politikajn opiniojn por ricevi nomumiĝon al iu ofico tiam, kiam la regno estas bone regata; resti silenta kaj trudi al si sindetenadon tiam, kiam la regno estas malbone regata”, kaj esti dece konduta, leĝobeema kaj “saĝa kaj singarda, por protekti vin kontraŭ ebla danĝero”.

Cetere, laŭ la aŭtoro, la doktrino de la mezeco estas ordinara kaj tamen profunda, facile sekvata kaj tamen malfacile primajstrita. Ĝi “komenciĝas en la manieroj de la ordinaraj viroj kaj virinoj”, ĝia ĝenerala ideo estis konata kaj praktikebla eĉ por la senkleraj homoj; sed ĝia abisma kvintesenco estas super la atingopovo eĉ de la sanktulo. Tio, kio estas la plej grava, estas kulturi la personan moralan karakteron kaj influi aliajn per sia ekstrema sincereco.

Kio do estas la bazo de la doktrino de la mezeco? *La Doktrino de Mezeco* deklaras en sia unua ĉapitro: “Tio, per kio la homo estas dotita de la Ĉielo, estas nomata la naturo; la sekvado de tiu naturo estas nomata la vojo de la devo; la reguligo de la vojo estas nomata instruado.” Tio signifas, ke la homa naturo estas donita de la Ĉielo; la devo de la homo estas sekvi la naturon de la Ĉielo, alivorte, sekvi la manieron de la Ĉielo; kaj iu ajn, kiu malsukcesas sekvi la naturon de la Ĉielo, devis esti civilizita. Ĝi diras ankaŭ en dudeka ĉapitro: “La sincereco estas la virto de la Ĉielo, kaj la atingo de la sincereco estas la virto de la homo”, kaj en la dudekunua ĉapitro: “la akrevida inteligenteco en la distingado de aferoj, kiu rezultas el la sincereco en la plej interna koro, estas kunnaskita naturo; la sincereco en la plej interna koro, kiu rezultas el la akrevida inteligenteco en la distingado de aferoj, estas atribuita al la edifado”. La supre-cititaj signifas, ke la sanktulo kaj la plej sincera homo, sekvante sian naturon, kondutas en maniero nature konforma al la virto de la Ĉielo; sed la ordinaraj homoj devas kulturi sin en konformeco kun la virto de la Ĉielo por akordigi sian konduton kun tiu virto, kaj tio estas la origino de la “edifado”. Estas do evidenta, ke la bazo de la doktrino de la mezeco, laŭ la aŭtoro, devis esti la virto de la Ĉielo. Tiu ĉi vidpunkto, kiu rigardis la mezecon kiel la plej altan regulon de konduto konformantan al kaj enkorpiĝon de la virto de la Ĉielo, faris la koncepton pri la mezeco demando koncernanta pri la rilato inter la Ĉielo kaj la homo, kaj sekve la vidpunkto mem falis en ideismon.

Nun oni volus demandi, kio do efektive estas “la mezeco”? *La Doktrino de Mezeco* diras en la unua ĉapitro: “Kiam la ĝojo, la kolero, la malĝojo kaj la feliĉo estas tenataj en la homa koro, tiam ili estas en la stato de la mezeco; kiam ili estas esprimitaj konforme al la moralaj normoj, tiam ili estas en la stato de harmonio; la mezeco estas la fundamento de ĉio sub la ĉielo, kaj la harmonio estas la universala leĝo; kun la mezeco kaj la harmonio la tero moviĝas en ordo, kaj ĉio sur ĝi kreskas kaj prosperas.” La supra paragrafo povas esti konsiderata kiel prinoto pri la mezeco. Resume, oni povas diri, ke la mezeco estas la

justeco aŭ senpatieco al ĉiuj, evito de kontraŭoj kaj elekto de la meza vojo. *La Doktrino de Mezeco* konsilas al homoj sin teni je la centro, por atingi la mezecon kaj harmonion, kaj per tio la homaj pensoj kaj la agoj estos limigitaj en la kadro de la feŭdaj politikaj kaj moralaj normoj, kaj la diversaj rilatoj inter individuoj estos reguligitaj. Ĝia fina celo estas, ke “la tero moviĝas en ordo, kaj ĉio sur ĝi kreskas kaj prosperas” — igi la socion teni la ekvilibron kaj firmigi la feŭdan socian ordon. En la okuloj de la konfuceanoj, la mezeco estis pli ol sublimes kaj idealigita virto, aŭ plej alta kaj plej bona principo kondukita en la mondo, aŭ perfekta filozofio pri la vivo; ĝi estis la enkorpiĝo de la virto de la Ĉielo. Kaj tial la konfuceanoj de la dinastio Song asertis, ke la mezeco estas “la ĝusta vojo sekveda de ĉiuj homoj sub la ĉielo kaj la fiksa principo reguliganta ĉion sub la ĉielo”, sekve la doktrino de mezeco fariĝis eterna vero valida kaj aplikebla ĉie.

Por diri mallonge, tio, kion la libro *La Doktrino de Mezeco* prilumis, estis la politikaj spertoj kaj moralaj ideoj akumulitaj kaj formitaj de la feŭdaj regantoj en iliaj traktado de sociaj kontraŭdiroj, kunordigo de interhomaj rilatoj kaj plialtigo de ilia sinkulturado, kaj ĝia celo estis firmigi la feŭdan regadon. Kaj tamen, ĝi liveras al ni valorajn materialojn por nia esplorado pri la konfuceisma penso, kaj ankaŭ estas tre valora heredaĵo de nia tradicia kulturo, kiu estas ankoraŭ utila kaj studinda por ni en multaj rilatoj en la nuna tempo.

Mi, kiel ĉino, tre fieras pri la ĉina riĉa kultura heredaĵo, kiun postlasis al ni niaj prapatroj. Mi elkreskis en la medio de la ĉina kulturo, kaj ekde mia infanaĝo mi ĉiam amas nian ĉinan tradicion kaj la saĝecon de la majstroj de la diversaj pensoskoloj antaŭ la dinastio Qin. Mi ĉiam havas la opinion, ke ĉinaj gravaj klasikaĵoj devos havi siajn Esperantajn tradukojn. Jen kial mi entreprenis la tradukon de tiu ĉi grava ĉina klasikaĵo.

Mia traduko sin bazas ĉefe sur la *Kolektitaj Komentarioj pri la Kvar Libro* (四书章句集注) de Zhu Xi, kun konsulto de kelkaj aliaj versioj de la originalo kun notoj kaj komentarioj de moderna ĉina lingvo, por pli precize kompreni la originalon kaj pli bone esprimi ĝin en Esperanto, sed malgraŭ tio mi devas peti pardonon de la legantoj pro mia limigita kapablo, kiu neeviteble kaŭzis neĝustaĵojn kaj erarojn en mia traduko.

WANG Chongfang, la tradukinto  
2019-07-22

## LA DOKTRINO DE MEZECO

### 中庸

*Mia majstro, la filozofo Cheng, diris, ke resti sen inklino al iu ajn el la du flankoj estas nomata “zhong”; allasi nenian ŝanĝiĝon estas nomata “yong”. “Zhong” signifas la ĝustan vojon sekvedan de ĉiuj homoj sub la ĉielo; “yong” signifas la fiksan principon reguligantan ĉion sub la ĉielo. Tiu ĉi verko enhavas la sinkulturajn metodojn en la menso, kiuj estis transdonataj de unu al alia, en la konfucea skolo, ĝis Zisi, kiu, timante, ke dum la longa tempopaso estiĝos eraraj kompreno pri ili, konfidis ilin al skriboj, kaj liveris la verkon al Mengzi. La libro, en la komenco, parolas pri unu principo; ĝi pli poste etendas ĝin al ĉiuj estaĵoj; Fine ĝi kunigas kaj revenigas ĉion sub tiun principon. Disvolvite, ĝi plenigas la universon; kunvolvite, ĝi retiriĝas kaj kaŝiĝas en mistereco. Ĝia profunda signifo meritas senfinan pripensadon. Ĝia tuto estas solida lernindaĵo.*

*La lerta leganto, esplorinte ĝin kun plezuro ĝis plena kompreno, povas meti ĝin en la praktikon dum sia tuta vivo kaj trovos, ke ĝia utilo povas esti neelĉerpebla.*

*子程子曰：“不偏之谓中，不易之谓庸。中者，天下之正道，庸者，天下之定理。”此篇乃孔门传授心法，子思恐其久而差也，故笔之于书，以授孟子。其书始言一理，中散为万事，末复合为一理，“放之则弥六合，卷之则退藏于密”，其味无穷，皆实学也。善读者玩索而有得焉，则终身用之，有不能尽者矣。*

## §01

Tio, per kio la homo estas dotita de la Ĉielo, estas nomata la naturo; la sekvado de tiu naturo estas nomata la vojo de la devo; la reguligo de la vojo estas nomata instruado.

*天命之谓性，率性之谓道，修道之谓教。*

Oni neniam forlasas la vojon de la devo eĉ dum momento, kaj se ĝi povus esti forlasita, ĝi ne povus esti nomata tia. La noblulo ĉiam estas diskreta kaj vigle atentema tiam, kiam li estas for de alies vido, kaj ankaŭ timema kaj singarda tiam, kiam li estas for de alies aŭdo. La noblulo neniam devas malbone konduki eĉ tiam, kiam li estas en privateco, nek malkaŝi malbonajn intencojn eĉ en bagatelaj aferoj. Jen kial la noblulo devas resti singarda precipe tiam, kiam li estas sola.

*道也者，不可须臾离也，可离非道也。是故君子戒慎乎其所不睹，恐惧乎其所不闻。莫见乎隐，莫显乎微，故君子慎其独也。*

Kiam la ĝojo, la kolero, la malĝojo kaj la feliĉo estas tenataj en la homa koro, tiam ili estas en la stato de la mezeco; kiam ili estas esprimataj konforme al la moralaj normoj, tiam ili estas en la stato de harmonio. La mezeco estas la fundamento de ĉio sub la ĉielo, kaj la harmonio estas la universala leĝo. Kun la mezeco kaj la harmonio la tero moviĝas en ordo, kaj ĉio sur ĝi kreskas kaj prosperas.

*喜怒哀乐之未发，谓之中；发而皆中节，谓之和。中也者，天下之大本也；和也者，天下之达道也。致中和，天地位焉，万物育焉。*

*En la unua ĉapitro, kiu estas donita supre, Zisi esprimas la opinion, kiu estis transdonita al li, kiel la bazo de lia pritraktado. Unue, ĝi klare montras, kiel la vojo de la devo estas sekvata returne al sia origino en la Ĉielo kaj estas neŝanĝebla, dum ĝia esenco estas disponebla en ni mem kaj neniel povas esti forlasita. Poste, ĝi parolas pri la graveco de la konservado kaj nutrado de tio ĉi kaj pri farado de atenta memekzameno laŭ ĝi. Fine, ĝi parolas pri meritaj atingoj kaj transforma influo de saĝaj kleruloj ĝis la plej alta grado. La deziro de Zisi estas, ke per tio ĉi la lernanto direktu siajn pensojn internen kaj, per serĉado en si mem, tie trovu tiujn ĉi verojn, por ke li povu sin deteni for de ĉiuj eksteraj tentoj egoismaj, kaj plenigu la mezuron de la boneco, kiu estas natura al li mem. Tiu ĉi ĉapitro, laŭ s-ro Yang, estas la resumo de la tuta verko. En la sekvantaj dek ĉapitroj Zisi citas la vortojn de la Majstro por kompletigi la signifon de tiu ĉi ĉapitro.*

*右第一章。子思述所传之意以立言：首明道之本原出于天而不可易，其实体备于己而不可离，次言存养省察之要，终言圣神功化之极。盖欲学者于此反求诸身而自得之，以去夫外诱之私，而充其本然之善，杨氏所谓一篇之体要是也。其下十章，盖子思引夫子之言，以终此章之义。*

## §02

Konfuceo diris: “La noblulo parolas kaj kondutas laŭ la doktrino de la mezeco, dum la malnoblulo parolas kaj kondutas kontraŭ tiu doktrino. La noblulo observas la doktrinon de la mezeco, ĉar lia alta moraleco ebligas al li ĉiam agi konforme al la moralaj normoj; la malnoblulo malobservas la doktrinon de la mezeco, ĉar lia degenerinta moraleco kaŭzas, ke li agu senskrupule.”

仲尼曰：“君子中庸，小人反中庸。君子之中庸也，君子而时中；小人之中庸也，小人而无忌惮也。”

*La supra estas la dua ĉapitro.*

*右第二章。*

## §03

Konfuceo diris: “La doktrino de la mezeco estas la kulmino de la virta perfekteco! Estas domaĝe, ke dum longa tempo nur tre malmultaj homoj povis meti ĝin en la praktikon.”

子曰：“中庸其至矣乎！民鲜能久矣！”

*La supra estas la tria ĉapitro.*

*右第三章。*

## §04

Konfuceo diris: “La kaŭzo, kial la doktrino de la mezeco ne estis praktikata dum longa tempo, laŭ mi kuŝas en tio, ke la konduto de la saĝuloj superas la normon de la mezeco, kaj la malsaĝuloj ne atingas tiun ĉi normon. La kaŭzo, kial la doktrino de la mezeco ne fariĝis evidenta, laŭ mi kuŝas en tio, ke la virtuloj superas la normon de la mezeco, kaj la malinduloj ne atingas tiun ĉi normon. Ĉiu trinkas kaj manĝas, sed tre malmultaj povas vere gustumi, kion ili trinkas kaj manĝas.”

子曰：“道之不行也，我知之矣，知者过之，愚者不及也；道之不明也，我知之矣，贤者过之，不肖者不及也。人莫不饮食也，鲜能知味也。”

*La supra estas la kvara ĉapitro.*

*右第四章。*

## §05

Konfuceo diris: “Ho ve! Probable la doktrino de la mezeco ne povos esti praktikata!”

子曰：“道其不行矣夫！”

*La supra estas la kvina ĉapitro.*

*右第五章。*

## §06

Konfuceo diris: “Shun (legenda monarko en la antikveco — trad.) povas esti kalkulata kiel homo kun granda saĝeco! Li estis demandema kaj amis esplori la vortojn de la ordinaraj homoj. Li kaŝis alies malbonajn kondutojn kaj diskonigis alies bonajn agojn. Ĉio, kion li faris, estis bazita sur la mezeco, kiun li akiris el la du ekstremoj diametre kontraŭaj. Tio klarigas, kial li estis estimata kiel Shun.”

子曰：“舜其大知也与！舜好问而好察迩言，隐恶而扬善，执其两端，用其中于民，其斯以为舜乎！”

*La supra estas la sesa ĉapitro.*

右第六章。

## §07

Konfuceo diris: “Ĉiu diras: ‘mi estas saĝa’. Sed li ne scias eskapi tiam, kiam li estas pelita en kaptilon. Ĉiu diras: ‘mi estas saĝa’. Sed li ne sin tenas je la doktrino de la mezeco, kiun li elektis al si, eĉ dum unu monato.”

子曰：“人皆曰予知，驱而纳诸罟获陷阱之中，而莫之知辟也。人皆曰予知，择乎中庸而不能期月守也。”

*La supra estas la sepa ĉapitro.*

右第七章。

## §08

Konfuceo diris: “La sinteno de Yan Hui (unu el la plej bonaj disĉiploj de Konfuceo — trad.) kontraŭ la vivo estas sekvi la doktrinon de la mezeco. Kiam li eklernis bonan doktrinon, li firme tenis ĝin en la koro kaj neniam forlasis ĝin.”

子曰：“回之为人也，择乎中庸，得一善，则拳拳服膺而弗失之矣。”

*La supra estas la oka ĉapitro.*

右第八章。

## §09

Konfuceo diris: “La imperio, ĝiaj regnoj, kaj ĝiaj familioj, povas esti perfekte regataj; la oficaĵaj rangoj kaj salajroj povas esti rifuzitaj; la nudigitaj tranĉiloj kun brila klingo povas esti tretataj, sed la doktrino de la mezeco estas malfacile atingita.”

子曰：“天下国家可均也，爵禄可辞也，白刃可蹈也，中庸不可能也。”

*La supra estas la naŭa ĉapitro.*



## §10

Kiam Zilu (unu el la proksimaj disĉiploj de Konfuceo — trad.) demandis pri la forteco de la karaktero, Konfuceo respondis: “Pri kiu forteco de la karaktero vi demandas, tiu de la sudulo, tiu de la nordulo aŭ tiu, kiun vi kulturas al vi mem? La sudulo estas forta en tio, kion li instruas al homoj la esencon de la grandanimeco, kaj mildeco, kaj li rekomendas ne fari venĝon al aliaj pro ties maljustaj agoj. Jen kia estas la forteco de la karaktero de la sudulo, kaj pri ĝi la nobluloj estas kontentaj. La nordulo estas forta per la armaĵo, kiun li metis sur sin, kaj per la armilo, kiun li tenas en la mano, por iri al sanga batalo sen timi la morton. Jen kia estas la forteco de la karaktero de la nordulo, kaj pri ĝi la bravaj fortuloj estas kontentaj. Tial la homo kun bona kulturiteco estas kvietema kaj modera sen sekvi blinde ĝeneralajn opiniojn, krom siajn ĝustajn. — Kiel firma li estas en sia forteco de la karaktero! Li firme staras sur la mezo sen flankiĝi al la du flankoj. — Kiel firma li estas en sia forteco de la karaktero! Se la regado estas bona en sia regno, li ne ŝanĝas la aspirojn, kiujn li nutris tiam, kiam li estis en sia retiriĝo. — Kiel firma li estas en sia forteco de la karaktero! Se la regado estas malbona en sia regno, li ankoraŭ sin tenas je siaj principoj ĝis la morto. — Kiel firma li estas en sia forteco de la karaktero!”

子路问强。子曰：“南方之强与？北方之强与？抑而强与？宽柔以教，不报无道，南方之强也，君子居之。衽金革，死而不厌，北方之强也，而强者居之。故君子和而不流，强哉矫！中立而不倚，强哉矫！国有道，不变塞焉，强哉矫！国无道，至死不变，强哉矫！”

*La supra estas la deka ĉapitro.*

右第十章。

## §11

Konfuceo diris: “Serĉi absurdajn kaj malklarajn sencojn kaj fari strangaĵojn, por rikolti laŭdojn de posteuloj, estas tio, kion mi neniam faras. Inter la homoj de bona kulturiteco, kiuj sekvas la doktrinon de la mezeco, iuj povas forlasi ĝin duonvoje, sed mi neniel povas ĉesi ĝin sekvi. La noblulo sekvas la doktrinon de la mezeco. Kvankam li povos resti senfama kaj nekonata al la mondo, tamen li sentas nenian bedaŭron. — Nur la saĝulo povas tiel agi.”

子曰：“素隐行怪，后世有述焉，吾弗为之矣。君子遵道而行，半涂而废，吾弗能已矣。君子依乎中庸，遯世不见知而不悔，唯圣者能之。”

*La supra estas la dekunua ĉapitro.*

右第十一章。

## §12

La filozofio de la vivo, kiun sekvas noblulo, estas ne nur komuna, sed ankaŭ profunda. Ĝia ĝenerala ideo estas konata al la malkleraj viroj kaj virinoj, sed ĝia profunda kvintesenco estas super la komprenkapablo eĉ de la saĝulo. Ĝia ĝenerala normo estas praktikebla por mezbonaj viroj kaj virinoj, sed ĝia plej alta postulo estas super la atingokapablo eĉ de la saĝulo. Grandioza estas la universo, tamen oni trovas en ĝi ion, pri kio oni ne estas kontenta. Tial la virto de altmorala homo, pri kiu noblulo parolas, estas tiel granda, ke la universo apenaŭ povas ĝin enteni; ĝi estas ankaŭ tiel malgranda, ke nenio en la universo povas ĝin disfendi. Estas dirite en *Libro de Poezio* (la plej frua antologio de poemoj kaj unu el la Kvin Klasikaĵoj — trad.): “Nizo flugas supren en la ĉielon, fiŝo naĝas malsupren en la abismon.” Tio analogie esprimas, ke la virto de la saĝulo, en siaj simplaj elementoj, estas alte klara kiel sur la tero, tiel ankaŭ en la ĉielo. La filozofio de la vivo, kiun la noblulo sekvas, komenciĝas en la manieroj de la ordinaraj viroj kaj virinoj, sed ĝia perfekta manifestiĝo hele brilas en la universo.

君子之道费而隐。夫妇之愚，可以与知焉，及其至也，虽圣人亦有所不知焉；夫妇之不肖，可以能行焉，及其至也，虽圣人亦有所不能焉。天地之大也，人犹有所憾。故君子语大，天下莫能载焉；语小，天下莫能破焉。诗云：“鸢飞戾天，鱼跃于渊。”言其上下察也。君子之道，造端乎夫妇；及其至也，察乎天地。

*La supra dekdua ĉapitro entenas la vortojn de Zisi kaj ilustras tion, kio estas dirita en la unua ĉapitro, nome “oni neniam forlasas la vojon”. En la sekvantaj ok ĉapitroj li citas, en diversaj manieroj, la vortojn de Konfuceo, por illustri ĝin.*

*右第十二章。子思之言，盖以申明首章道不可离之意也。其下八章，杂引孔子之言以明之。*

## §13

Konfuceo diris: “La doktrino de la mezeco sin distancigas de neniuj personoj. Se iu, kiu sekvas la doktrinon, faras ĝin nealirebla por aliaj, tiam tio, kion li sekvas, neniel plu estas la doktrino de la mezeco. Estas dirite en *Libro de Poezio*: ‘Tranĉu pecon da ligno por fari el ĝi tenilon de hakilo, vi trovos ĝian grandecon proksimume taŭga.’ Sed kiam vi strabe komparas ĝin kun la tenilo en via mano, vi trovos ĝian grandecon netaŭga. Tial la monarko de regno devas regi super la popolo laŭ ilia individua naturo, en la maniero konvena al ili, kaj ĉesi entrudiĝi en ilian konduton tuj kiam iliaj eraroj estas korektitaj.

子曰：“道不远人。人之为道而远人，不可以为道。诗云：‘伐柯伐柯，其则不远。’执柯以伐柯，睨而视之，犹以为远。故君子以人治人，改而止。

“Oni alproksimiĝas al la doktrino de la mezeco tiam, kiam oni estas fidela kaj indulgema al aliaj. Tio, kion vi ne volus, ke aliaj faru al vi, ne devus esti farita al ili.

“忠恕违道不远，施诸己而不愿，亦勿施于人。

“La kodo de la konduto de la noblulo konsistas el kvar reguloj, sed mi povas plenumi neniun el ili: mi ne servas mian patron tiel, kiel la filo devus; mi ne servas la monarkon tiel, kiel la regato devus; mi ne servas mian pli aĝan fraton tiel, kiel la pli juna frato devus; mi

ne prenas la iniciaton fari tion, kion mi postulas, ke miaj amikoj faru. Mi ne kuraĝas ĉesigi mian penadon plibonigi miajn mankojn en la observado de la moralaj normoj kaj en la paroloj kun singardo. Mi ne kuraĝas fari troon en miaj vortoj, eĉ se mi ja observas la moralajn normojn kaj parolas kun singardo. Tial, oni devas pensi pri siaj agoj tiam, kiam oni parolas, kaj oni devas pensi pri siaj vortoj tiam, kiam oni agas. Kial do la noblulo povus esti ne honesta?”

“君子之道四，丘未能一焉：所求乎子，以事父未能也；所求乎臣，以事君未能也；所求乎弟，以事兄未能也；所求乎朋友，先施之未能也。庸德之行，庸言之谨，有所不足，不敢不勉，有余不敢尽；言顾行，行顾言，君子胡不慥慥尔！”

*La supra estas la dektria ĉapitro.*

*右第十三章。*

## §14

La noblulo agas konforme al sia rango kaj deziras nenion, kio estas super lia situacio. Se li estas riĉa kaj okupas altan rangon, li faras tion, kio estas konvena al la pozicio de riĉulo kaj altrangulo; se li estas malriĉa kaj okupas malaltan rangon, li faras tion, kio estas konvena al la pozicio de malriĉulo kaj malaltrangulo; se li estas inter la barbaraj triboj, li faras, kion la barbara tribano devas fari; se li estas en mizero, li faras, kion la mizerulo devas fari. La noblulo scias resti kontenta pri sia loko, kian ajn pozicion li okupas.

君子素其位而行，不愿乎其外。素富贵，行乎富贵；素贫贱，行乎贫贱；素夷狄，行乎夷狄；素患难，行乎患难；君子无入而不自得焉。

Kiam li okupas altan pozicion, li traktas malestime aŭ krude neniun, kiu estas malsupera al li; kiam li okupas malaltan pozicion, li humiliĝas al neniun, kiu estas supera al li. Ĉar li ĉiam honestigas sian konduton kaj neniam metas troajn postulojn al aliaj, li nutras en si nenian rankoron kontraŭ ili. Li ne plendas kontraŭ la Ĉielo tiam, kiam li levas sian rigardon supren, nek riproĉas homojn tiam, kiam li mallevas la rigardon malsupren. Tial la homo de nobla karaktero ĉiam restas en sia loko kun trankvileco atendante la volon de la Ĉielo, dum la homo de malnobla karaktero ĉiam hazarde serĉas bonŝancajn okazojn aŭ evitas akcidentojn. Konfuceo diris: “La arkpaŝado estas analoga al la traktado de aferoj fare de noblulo. Se li maltrafas la centron de la celtabulo, li devas sin returni kaj serĉi la kaŭzon de sia malsukceso en si mem.

在上位不陵下，在下位不援上，正己而不求人则无怨。上不怨天，下不尤人。故君子居易以俟命，小人行险以徼幸。子曰：“射有似乎君子；失诸正鹄，反求诸其身。”

*La supra estas la dekkvara ĉapitro.*

*右第十四章。*

## §15

La praktikado de la kodo de la noblula konduto povas esti komparata kun la farado de longa vojaĝo, kiu devas komenciĝi de la tuj proksima punkto, aŭ kun la supreniro sur alton, kiu devas komenciĝi de la plej malalta tero.

君子之道，辟如行远必自迩，辟如登高必自卑。

Estas dirite en *Libro de Poezio*:

“Vivi feliĉe kun siaj edzino kaj infanoj

estas kiel muzikadi harmonie.

Vivi fratece kun siaj fratoj

estas ĝojo en konkordo.

Ke via familio estu nur feliĉa!

Ke viaj edzino kaj infanoj estu nur ĝojaj!”

诗曰：“妻子好合，如鼓瑟琴；兄弟既翕，和乐且耽；宜尔室家；乐尔妻帑。”

Konfuceo diris: “En tia stato la gepatroj certe kontentiĝos.”

子曰：“父母其顺矣乎！”

*La supra estas la dekkvina ĉapitro.*

右第十五章。

## §16

Konfuceo diris: “Kiel potenca estas la virto de la supernaturaj estaĵoj. Kvankam rigardate nevidebla, aŭskultate neaŭdebla, ĝia ĉieesteco nutras ĉion sub la ĉielo, por ke ĉiuj popoloj en la mondo abstinu de viando kaj vino, prenu banon kaj bone sin vestu por fari oferadon al ĝi. Ili sentas ĝian ekzistadon, kiel se ĝi estas super aŭ ĉirkaŭ ili.

子曰：“鬼神之为德，其盛矣乎！视之而弗见，听之而弗闻，体物而不可遗。使天下之人齐明盛服，以承祭祀。洋洋乎！如在其上，如在其左右。”

Estas dirite en *Libro de Poezio*:

‘La alveno de la dioj estas neantaŭvidebla.

Kiel do ni povus ne time respekti ilin?’

La potenco de la supernaturaj estaĵoj trapenetas ĉion kaj povas fari manifestiĝantaj ĉiujn malgrandegaĵojn, kaj ĝia fidindeco estas tiel evidenta, ke ĝi neniel povas esti kaŝita.”

诗曰：“神之格思，不可度思！矧可射思！”夫微之显，诚之不可揜如此夫。”

*La supra estas la deksesna ĉapitro.*

右第十六章。

## §17

Konfuceo diris: “Shun povas esti kalkulata kiel la plej sindona filo al siaj gepatroj. Lia virto estas tiu de la saĝulo; lia digno estas tiu de la Filo de la Ĉielo. Li posedas la tutan mondon, — jen lia riĉeco. Li meritis kaj meritos por ĉiam la oferadon en la templo de la prapatroj de la imperiestra familio fare de la posteularo. Tial, havante tian virton, li nepre devis posedi sian dignon, sian riĉecon, sian altan salajron, sian bonan reputacion kaj sian longvivecon. La Ĉielo kreas ĉiujn estaĵojn en la universo kaj traktas ĉiun el ili en la maniero konvena al ties naturo, kulturante la kultureblajn kaj lasante fali la ŝanceliĝantajn.

子曰：“舜其大孝也与！德为圣人，尊为天子，富有四海之内。宗庙飨之，子孙保之。故大德必得其位，必得其禄，必得其名，必得其寿。故天之生物，必因其材而笃焉。故栽者

培之，倾者覆。

Estas dirite en *Libro de Poezio*:

‘Kiel admirinde bona, afabla estas la reĝo de Wen de la dinastio Zhou!

Kiel glora estas lia merito!

Li igas siajn regatojn vivi en paco kaj feliĉo.

Lia reĝado, antaŭdestinita de la Ĉielo, daŭros longe,

Kaj liaj bonfaroj, benitaj de la Ĉielo, restos por ĉiam.’

Tial la homo de perfekta virto certe fariĝos la Filo de la Ĉielo laŭ ties volo.”

诗曰：‘嘉乐君子，宪宪令德！宜民宜人；受禄于天；保佑命之，自天申之！’故大德者必受命。”

*La supra estas la deksepa ĉapitro.*

右第十七章。

## §18

Konfuceo diris: “La sola persono libera de ĉia maltrankvilo povus esti la reĝo Wen de la dinastio Zhou. Lia patro estis la reĝo Ji, kaj lia filo estis la reĝo Wu. Lia patro metis la fundamenton de la dinastio, kaj lia filo heredis ĝin. La reĝo Wu daŭrigis la farojn de Tai Wang, Wang Ji kaj la reĝo Wen, kaj, renversinte la dinastion Yin, akiris la regadon super la imperio. Li konservis sian distingitan renomon kaj estis estimata kiel la Filo de la Ĉielo, posedante la tutan mondon kaj meritante la oferadon en la templo de la prapatroj de la imperiestra familio fare de la posteularo de generacio al generacio.

子曰：“无忧者其惟文王乎！以王季为父，以武王为子，父作之，子述之。武王纘大王、王季、文王之绪。壹戎衣而有天下，身不失天下之显名。尊为天子，富有四海之内。宗庙飨之，子孙保之。”

“En sia maljuneco la reĝo Wu ricevis la tronon laŭ la volo de la Ĉielo, kaj la duko de Zhou plenumis la grandan taskon de la reĝo Wen kaj la reĝo Wu, oficiale deklarante la mortintajn Tai Wang kaj Wang Ji kiel reĝojn kaj farante oferadon al iliaj prapatroj laŭ la ritoj por la Filo de la Ĉielo. Kaj tiu ĉi regulo poste etendiĝis al princoj de la imperio, la grandaj oficistoj, la *shi*-oj (socia tavolo en la antikva Ĉinio inter superaj ŝtatoficistoj kaj ordinaraĵoj — trad.), kaj la ordinaruloj. Se la patro estis granda oficisto kaj la filo estis *shi*-o, kiam la patro mortis, lia funebra ceremonio estis celebrata kiel tiu por granda oficisto, kaj la oferado estis tiu farita de *shi*-o; se la patro estis *shi*-o kaj la filo estis granda oficisto, tiam la funebra ceremonio estis celebrata kiel tiu por *shi*-o, kaj la oferado estis tiu farita de granda oficisto. La konvencio de unujara funebrado estis observata de la grandaj oficistoj, la konvencio de trijara funebrado estis observata de la Filo de la Ĉielo; kaj la konvencioj de la funebra periodo por la patro aŭ la patrino estis observataj de ĉiuj nobeloj kaj simpluloj sendiference.”

武王末受命，周公成文武之德，追王大王、王季，上祀先公以天子之礼。斯礼也，达乎诸侯大夫，及士庶人。父为大夫，子为士；葬以大夫，祭以士。父为士，子为大夫；葬以士，祭以大夫。期之丧达乎大夫，三年之丧达乎天子，父母之丧无贵贱一也。”

*La supra estas la dekoka ĉapitro.*

右第十八章。

## §19

Konfuceo diris: “La reĝo Wu kaj la duko de Zhou bonege konis kaj plenumis la filan devon al la gepatroj. La devo de sindona filo signifas plene efektivigi la volon de la prapatroj. Dum la oferado al la prapatroj en la printempo kaj aŭtuno oni devas ripari la prapatran templon, elmeti la vazojn por oferaĵoj kaj la vestojn postlasitajn de la prapatroj, kaj ankaŭ prezenti la laŭsezonajn nutraĵojn por oferado.

子曰：“武王、周公，其达孝矣乎！夫孝者：善继人之志，善述人之事者也。春秋修其祖庙，陈其宗器，设其裳衣，荐其时食。

“La reguloj de la oferado en la prapatra templo estas destinitaj por fari distingon inter la patro kaj la filo, inter pliaĝulo kaj la plijunulo, kaj inter la parencoj proksimaj kaj malproksimaj; aranĝi la sinsekvon laŭ la rangoj estas por fari distingon inter la homoj noblaj kaj malnoblaj; aranĝi la sinsekvon laŭ la pozicioj estas por fari distingon inter la homoj eminentaj kaj ordinaraj; lasi la malsuperajn proponi toston laŭorde al la pli superaj estas por reflekti la favoron donitan al la malsuperuloj; fiksi la sidlokojn ĉe festeno laŭ la koloro de la kapharoj estas por fari distingon inter la aĝoj.

宗庙之礼，所以序昭穆也；序爵，所以辨贵贱也；序事，所以辨贤也；旅酬下为上，所以逮贱也；燕毛，所以序齿也。

“Oni devas stari sur la fiksita loko, observi la etiketojn starigitajn de la grandaj reĝoj de la antaŭaj dinastioj, ludi iliajn muzikojn, respekti, kion ili respektis, kaj ami, kion ili amis. Sekve oni servas la mortintajn kiel la vivantajn aŭ servas la neekzistantajn kiel la ekzistantajn, — jen la plej perfekta virto de sindona filo.

“La ceremonioj de la oferado al la Ĉielo kaj Tero estas dediĉitaj al la Dio; la ceremonioj de la oferado en la prapatraj temploj estas por kulti la prapatrojn. Se oni bone komprenas la signifojn de tiuj malsamaj ritoj, tiam la regado de la reĝlando estos tiel facila kiel vido al sia manplato.”

践其位，行其礼，奏其乐，敬其所尊，爱其所亲，事死如事生，事亡如事存，孝之至也。郊社之礼，所以事上帝也，宗庙之礼，所以祀乎其先也。明乎郊社之礼、禘尝之义，治国其如示诸掌乎。”

*La supra estas la deknaŭa ĉapitro.*

*右第十九章。*

## §20

Kiam la duko Ai, suvereno de la regno Lu, demandis pri la regado de la regno, Konfuceo respondis: “La dekretoj de la reĝoj Wen kaj Wu de la dinastio Zhou pri la regado estis metitaj en la kodojn kaj registrojn. Kun la saĝaj monarkoj kaj la virtaj ministroj, la dekretoj de la reĝoj Wen kaj Wu povis esti aplikitaj; sen tiaj monarkoj kaj ministroj, tiuj dekretoj estus nuligitaj. Por elekti la ĝustajn personojn oni devas esti lerta en la distingo kaj uzo de tiuj, kiuj estas diligentaj en la servado al la regno; por utiligi la teron oni devas plantadi arbojn kaj arbustojn. Nur kiam tia lerteco estas konata kaj aplikata, la regado de

la regno estas tiel facila, kiel la plantado de fragmitoj, kiuj kreskas tre rapide. La lerteco de la regna regado kuŝas en la akiro de la virtaj kapabluloj, kaj tiaj personoj povas esti akiritaj dank' al la kulturita karaktero de la reganto. Por bone kulturi sin mem, la reganto devas agi laŭ la normoj ĝenerale akceptitaj sub la Ĉielo; por agi laŭ la normoj ĝenerale akceptitaj sub la Ĉielo, li devas sekvi la principon de la humaneco.

哀公问政。子曰：“文武之政，布在方策。其人存，则其政举；其人亡，则其政息。人道敏政，地道敏树。夫政也者，蒲卢也。故为政在人，取人以身，修身以道，修道以仁。

“Esti humana signifas ami la homon. Tenante vin proksima al tiuj, kiuj estas al vi karaj, vi praktikas la plej grandan elementon de la humaneco. Esti ‘justa’ signifas esti ‘deca’. Respektante la virtajn kapablulojn, vi praktikas la plej grandan elementon de la justeco. La malsamaj gradoj de via proksimeco al la karaj, kiuj vin amas kaj estimas, kaj la malsamaj gradoj de via respekto al la virtaj kapabluloj, rezultas el la malsamaj postuloj de la deco. Tial tiuj, kiuj okupas la pozicion de reganto, devas bone kulturi sin mem. Tiuj, kiuj volas bone kulturi sin mem, devas bone servi siajn gepatrojn; tiuj, kiuj volas bone servi siajn gepatrojn, devas bone scii la kialojn de la respekto al la virtaj kapabluloj kaj de la amo al aliaj; tiuj, kiuj volas scii tiujn kialojn, devas lerni pri la leĝoj de la Ĉielo.”

“仁者人也，亲亲为大；义者宜也，尊贤为大；亲亲之杀，尊贤之等，礼所生也。在下位不获乎上，民不可得而治矣！故君子不可以不修身；思修身，不可以不事亲；思事亲，不可以不知人；思知人，不可以不知天。”

La grandaj normoj ĝenerale akceptitaj sub la Ĉielo inkluzivas kvin aspektojn, kies efektivigo dependas de tri specoj de morala karaktero. La rilato inter la monarko kaj liaj regatoj, la rilato inter la patro kaj la filo, la rilato inter la edzo kaj la edzino, la rilato inter la fratoj, kaj la rilato inter la amikoj, estas la kvin aspektoj. La tri specoj de morala karaktero, nome la saĝeco, bonkoreco kaj kuraĝo, estas universale respektataj sub la Ĉielo, kaj la kondiĉoj necesaj por praktiki tian moralan karakteron, estas la samaj. Unuj naskiĝas kun la scio pri la supre-diritaĵo, aliaj sciiĝas per lernado, kaj ankoraŭ aliaj akiras la sciojn per malfacila, eĉ dolora spertado, sed la rezultoj, kiujn la sciiĝo estigas sur homojn, estas la samaj. Oni praktikas la supre-diritaĵon kun malsamaj sintenoj. Unuj kun trankvila konscienco, aliaj kun la deziro serĉi profiton, ankoraŭ aliaj kun nevolonteco, sed la rezultoj, kiujn la praktikado estigas sur homojn, estas la samaj.

天下之达道五，所以行之者三：曰君臣也，父子也，夫妇也，昆弟也，朋友之交也；五者天下之达道也。知、仁、勇三者，天下之达德也，所以行之者一也。或生而知之，或学而知之，或困而知之，及其知之一也；或安而行之，或利而行之，或勉强而行之，及其成功一也。

Konfuceo diris: “Tiuj, kiuj amas lernadon, alproksimiĝas al la saĝeco; tiuj, kiuj persistas en bonfarado, alproksimiĝas al la humaneco; kaj tiuj, kiuj havas la hontosenton, alproksimiĝas al la kuraĝo. Kiam oni scias pri la supraj tri, oni scias plialtigi sian kulturitecon; kiam oni scias plialtigi sian kulturitecon, oni scias regi super la popolo; kiam oni scias administri la aferojn de la popolo, oni scias regi la imperion kun ĉiuj ĝiaj regnoj kaj familioj.”

子曰：“好学近乎知，力行近乎仁，知耻近乎勇。知斯三者，则知所以修身；知所以修身，则知所以治人；知所以治人，则知所以治天下国家矣。”

Ĉiuj, kiuj sin okupas je la regado de la imperio kun ĉiuj ĝiaj regnoj kaj familioj, devas sekvi la jenajn naŭ regulojn kiel normojn: plialtigi sian kulturitecon, estimi la virtajn

kapablulojn, teni sin proksima al siaj karaj personoj, respekti la ministrojn, montri zorgemon al la regnificistoj, ami la popolon kiel siajn filojn, vaste varbi metiistojn, praktiki la politikon de mildeco en la landlimaj regionoj, kaj pacigi la feŭdajn dukojn kaj princojn. Plialtigante sian kulturitecon, la reganto atingas pli altan moralan nivelon; estimante la virtajn kapablulojn, la reganto povas eviti perpleksecon tiam, kiam li renkontas problemojn; tenante sin proksima al siaj karaj personoj, li havas nenian parencon, kiu gardus rankoron kontraŭ li; respektante la ministrojn, li povas esti klarmensa en sia laboro; montrante zorgemon al la regnificistoj, li povas ricevi de ili redonon per duobla servado; amante la popolon kiel siajn filojn, li stimulas ilin labori pli diligente; vaste varbante metiistojn, li disponas abundon da riĉaĵoj; praktikante la politikon de mildeco en la landlimaj regionoj, li povas igi tieajn barbarajn tribojn memvole submeti sin al li; kaj, pacigante la feŭdajn dukojn kaj princojn, li povas regi la tutan popolon sub la ĉielo tiel, ke ili ĉiuj time respektas lin.

凡为天下国家有九经，曰：修身也，尊贤也，亲亲也，敬大臣也，体群臣也，子庶民也，来百工也，柔远人也，怀诸侯也。修身则道立，尊贤则不惑，亲亲则诸父昆弟不怨，敬大臣则不眩，体群臣则士之报礼重，子庶民则百姓劝，来百工则财用足，柔远人则四方归之，怀诸侯则天下畏之。

“Teni pian koron kaj dignan aspekton kaj rifuzi fari ĉion, kio estas kontraŭa al la deco, — jen estas por la reganto la maniero plialtigi sian kulturitecon. Teni sin for de tiuj, kiuj diras malicajn vortojn pri aliaj, distancigi sin de belaj virinoj, malŝati la riĉecon kaj ŝati la moralan karakteron, — jen estas por li la maniero instigi la virtajn kapablulojn al honesta devopleno. Doni al ili honoran pozicion kaj plialtigi ilian salajron kaj dividi kun ili la ŝatojn kaj malŝatojn, — jen estas por li la maniero igi siajn karajn personojn pli ami lin. Meti sufiĉajn subulojn sub la disponon de la ministroj, — jen estas por li la maniero pliefikigi ilian servadon al la regno. Teni sian vorton kaj plialtigi la salajron de la regnificistoj, — jen estas por li la maniero instigi ilin al pli diligenta laboro. Servutigi la popolon en la ĝusta tempo kaj malpezigi la imposton, — jen estas por li la maniero altiri al si pli da popolanoj. Pagi al la metiistoj salajron kaj liveri al ili nutraĵon surbaze de ĉiutaga kaj ĉiumonata kontrolado de ilia laboro, — jen estas por li la maniero stimuli ilian entuziasmon en laboro. Deziri bonan vojaĝon al tiuj, kiuj forveturas, kaj bonvenigi tiujn, kiuj alvenas, laŭdi tiujn, kiuj faras bonojn kaj simpatii tiujn, kiuj estas malkapablaj, — jen estas por li la maniero montri mildecon al la popolo de la landlimaj regionoj. Daŭrigi la genealogian linion, kiu estas preskaŭ rompita, revivigi la dekadencintajn regnojn, kvietigi tumultojn, subteni tiujn, kiuj estas en malfacilo kaj danĝero, doni aŭdiencojn kaj akcepti senditojn en la difinita tempo, donaci pli da rekompencoj kaj postuli malpli da tributoj, — jen estas por li la maniero pacigi la feŭdajn dukojn kaj princojn. Ĉiuj, kiuj sin okupas je la regado de la imperio kun ĉiuj ĝiaj regnoj kaj familioj, devas sekvi la naŭ regulojn kiel normojn. Kaj la kondiĉoj necesaj por praktiki la naŭ regulojn estas la samaj.

齐明盛服，非礼不动，所以修身也；去谗远色，贱货而贵德，所以劝贤也；尊其位，重其禄，同其好恶，所以劝亲亲也；官盛任使，所以劝大臣也；忠信重禄，所以劝士也；时使薄敛，所以劝百姓也；日省月试，既稟称事，所以劝百工也；送往迎来，嘉善而矜不能，所以柔远人也；继绝世，举废国，治乱持危，朝聘以时，厚往而薄来，所以怀诸侯也。凡为天下国家有九经，所以行之者一也。

Prepariteco certigas sukceson, dum neprepariteco kaŭzas malsukceson. Kun



antaŭpenso pri siaj vortoj dirotaj oni povas eviti subitan parolhalton; kun antaŭpenso pri aperonta problemo oni povas eviti frustrigojn; kun antaŭpenso pri sia ago farota oni povas eviti erarojn; kun antaŭpenso pri sia kondutprincipo sekvota oni povas eviti venon en senelirejon.

凡事豫则立，不豫则废。言前定则不跲，事前定则不困，行前定则不疚，道前定则不穷。

Se iu subulo ne ĝuas la fidon de sia superulo, li neniel povas administri la popolajn aferojn. Ekzistas maniero por akiri la fidon de la superulo: oni ne povas esti fidata de la superulo, se oni ne havas la fidon de siaj amikoj. Ekzistas maniero por akiri la fidon de siaj amikoj: oni ne povas esti fidata de siaj amikoj, se oni ne estas obeema al siaj gepatroj. Ekzistas maniero por esti obeema al siaj gepatroj: oni ne povas esti obeema al siaj gepatroj, se oni ne estas sincera. Ekzistas maniero por esti sincera: oni ne povas esti sincera, se oni ne scias, kio estas bona.

在下位不获乎上，民不可得而治矣；获乎上有道：不信乎朋友，不获乎上矣；信乎朋友有道：不顺乎亲，不信乎朋友矣；顺乎亲有道：反诸身不诚，不顺乎亲矣；诚身有道：不明乎善，不诚乎身矣。

La sincereco estas la virto de la Ĉielo, kaj la atingo de la sincereco estas la virto de la homo. Tiu, kiu posedas la sincerecon, povas senpene trafi ion ajn, kio estas ĝusta, kaj atingi la komprenon eĉ sen pripensado, sed lia konduto estas spontanee konforma al la normo starigita de la Ĉielo; — li estas la saĝulo, kiu nature kaj facile enkorpigas la virton de la Ĉielo. Koncerne la ordinarajn homojn, ili devas fari elekton kaj firme sin teni je kio estas ĝusta. Por tion atingi, ili devas vaste studi, detale demandadi, zorge pripensi, klare distingi kaj serioze praktiki.

诚者，天之道也；诚之者，人之道也。诚者不勉而中，不思而得，从容中道，圣人也。诚之者，择善而固执之者也。博学之，审问之，慎思之，明辨之，笃行之。

Se oni decidas ion studi, oni neniel devas forlasi la studadon, antaŭ ol plene posedi tion, kion oni studas. Se oni decidas informiĝi pri io, oni neniel devas ĉesi demandadi, antaŭ ol plene ekkompreni tion, pri kio oni informiĝas. Se oni decidas pensi pri io, oni neniel devas ĉesi pensadi, antaŭ ol atingi la bezonatan rezulton de sia pripensado. Se oni decidas fari distingon, oni neniel devas ĉesi tion fari, antaŭ ol sukcese fari klaran distingon inter aferoj. Se oni decidas fari praktikadon, oni neniel devas ĉesi tion fari, antaŭ ol persiste daŭrigi la praktikadon de la doktrino ĝis la fino. Se aliaj sukcesas per unu fojo, mi penados cent fojojn ĝis mi atingos la sukceson. Se aliaj sukcesas per dek fojoj, mi penados mil fojojn! Se tia penado estos efektive farita, la malsaĝa certe fariĝos inteligenta, kaj la malforta certe fariĝos forta.

有弗学，学之弗能弗措也；有弗问，问之弗知弗措也；有弗思，思之弗得弗措也；有弗辨，辨之弗明弗措也；有弗行，行之弗笃弗措也；人一能之己百之，人十能之己千之。果能此道矣，虽愚必明，虽柔必强。

*La supra estas la dudeka ĉapitro.*

*右第二十章。*

## §21

La akrevida inteligenteco en la distingado de aferoj, kiu rezultas el la sincereco en la

plej interna koro, estas kunnaskita naturo; la sincereco en la plej interna koro, kiu rezultas el la akrevida inteligenteco en la distingado de aferoj, estas atribuita al la edifado. Kiam oni estas sincera en sia plej interna koro, oni povas esti tre akrevida en la distingado de aferoj; kaj kiam oni estas akrevida en la distingado de aferoj, oni povas esti tre sincera en sia plej interna koro.

自诚明，谓之性；自明诚，谓之教。诚则明矣，明则诚矣。

*La supra estas la dudekunia ĉapitro. Zisi daŭrigas en ĝi la traktadon kaj klarigas la temojn “la virto de la Ĉielo” kaj “la virto de la homo”, menciitajn en la antaŭa ĉapitro. La sekvantaj dek du ĉapitroj ĉiuj estas el la vortoj de Zisi, ripetade ilustrante la signifon de tiu ĉi.*

*右第二十一章。子思承上章夫子天道、人道之意而立言也。自此以下十二章，皆子思之言，以反复推明此章之意。*

## §22

Nur la saĝulo, kiu estas la plej sincera, povas disvolvi sian propran naturon ĝis la perfekteco. Kiam li kapablas plene disvolvi sian propran naturon, li povas fari la samon al la naturo de la amasoj. Kiam li kapablas plene disvolvi la naturon de la amasoj, li povas fari la samon al la naturo de ĉiuj estaĵoj sub la ĉielo. Kiam li kapablas plene disvolvi la naturon de ĉiuj estaĵoj sub la ĉielo, li povas helpi al la Ĉielo kaj la Tero kreskigi kaj nutri ĉiujn estaĵojn. Kiam li kapablas helpi al la Ĉielo kaj la Tero kreskigi kaj nutri ĉiujn estaĵojn, tiam li povas stari flanko ĉe flanko kun la Ĉielo kaj la Tero.

唯天下至诚，为能尽其性；能尽其性，则能尽人之性；能尽人之性，则能尽物之性；能尽物之性，则可以赞天地之化育；可以赞天地之化育，则可以与天地参矣。

*La supra estas la dudekdua ĉapitro.*

*右第二十二章。*

## §23

Ankaŭ tiu, kiu estas tuj malsupera al la saĝulo, povas esti sincera en sia plej interna koro, kvankam sin okupante nur je malpli gravaj aferoj. Kiam oni estas sincera en sia plej interna koro, oni nepre devas manifesti sian sincerecon. La sincereco, manifestiĝante, fariĝas hele brila. Hele brila, ĝi frapas la koron de la homo, kaj ŝanĝas lian menson. Kiam la menso estas ŝanĝita, ĝi transformas la regantajn morojn kaj kutimojn. Tiu ĉi tasko povas esti plenumita nur de tiu, kiu posedas la plej kompletan sincerecon sub la ĉielo.

其次致曲，曲能有诚，诚则形，形则着，着则明，明则动，动则变，变则化，唯天下至诚为能化。

*La supra estas la dudektria ĉapitro.*

*右第二十三章。*

## §24

Kiam oni estas ekstreme sincera, oni povas antaŭvidi estontaĵojn. Bonaj antaŭsignoj estas vidataj tiam, kiam la lando iras al prospero, kaj ankaŭ malbonaj antaŭsignoj estas vidataj tiam, kiam la lando iras al dekadenco. Tiaj antaŭsignoj aperas sur akileoj kaj testudŝeloj (ambaŭ uzataj por divenado — trad.), kaj estas reflektitaj en la movoj de la kvar membroj de la koncernataj personoj. Kiam katastrofo aŭ feliĉo estas okazonta, tio, kio turniĝos en bonon, estas antaŭsciata, kaj tiel estas tio, kio turniĝos en malbonon. Tial la ekstreme sincera povas esti komparata kun la supernaturaj estaĵoj.

至誠之道，可以前知。國家將興，必有禎祥；國家將亡，必有妖孽；見乎蓍龜，動乎四體。禍福將至：善，必先知之；不善，必先知之。故至誠如神。

*La supra estas la dudekkvara ĉapitro.*

*右第二十四章。*

## §25

La sincereco estas tio, per kio oni povas sin perfektigi; la doktrino estas tio, per kio oni sin gvidas. La sincereco estas la fino kaj la komenco de ĉio. Sen la sincereco ekzistus nenio. Tial la noblulo rigardas kiel plej valoran la sincerecon. Per la sincereco li povas perfektigi pli ol sin mem: li povas perfektigi ĉiujn estaĵojn. Perfektigi sin mem estas lia perfekta virto; perfektigi ĉiujn estaĵojn estas lia saĝeco. Tiu ĉi virto, rezultanta el la homa natura instinkto, konformas al la leĝo ekzistanta en kaj ekster la universo, tial la noblulo devas sekvi ĝin en ĉiu momento de sia vivo.

誠者自成也，而道自道也。誠者物之終始，不誠無物。是故君子誠之為貴。誠者非自成己而已也，所以成物也。成己，仁也；成物，知也。性之德也，合外內之道也，故時措之宜也。

*La supra estas la dudekkvina ĉapitro.*

*右第二十五章。*

## §26

La ekstrema sincereco neniam ĉesas ekzisti. Ĉar ĝi neniam ĉesas ekzisti, ĝi daŭras; ĉar ĝi daŭras, ĝi efikas; ĉar ĝi efikas, ĝi povas esti transdonata al la malproksima estonteco; ĉar ĝi povas esti transdonata al la malproksima estonteco, ĝi estas vasta kaj profunda; ĉar ĝi estas vasta kaj profunda, ĝi estas alta kaj brila. Vasta kaj profunda, ĝi portas ĉiujn estaĵojn sub la ĉielo; alta kaj brila, ĝi kovras ĉiujn estaĵojn sub la ĉielo; longe daŭranta, ĝi perfektigas ĉiujn estaĵojn sub la ĉielo. Ĝi estas tiel vasta kaj profunda, ke ĝi sin egaligas al la tero; tiel alta kaj brila, ke ĝi sin egaligas al la ĉielo; tiel longe daŭranta, ke ĝi sin faras senfina. Sekve ĝi, sen sin montri, estas klara al ĉiuj por vidi; sen sin movi, transformas ĉiujn estaĵojn; sen fari penon, sukcesas en la plenumo de io ajn.

故至誠無息。不息則久，久則征，征則悠遠，悠遠則博厚，博厚則高明。博厚，所以載

物也；高明，所以覆物也；悠久，所以成物也。博厚配地，高明配天，悠久无疆。如此者，不见而章，不动而变，无为而成。

La naturo de la Ĉielo kaj la Tero povas esti prezentata per unu frazo: ĉar ili estas konstantaj en sia sincereco, ilia maniero perfektigi ĉiujn estaĵojn estas senfine subtila. La naturo de la Ĉielo kaj la Tero estas vasta, profunda, alta, brila, konstanta, kaj ĉiam daŭranta. La ĉielo, kiu nun pendas antaŭ ni, estas ne pli ol la amasiĝo de pecoj da brileco, sed, je sia senfineco, ĝi havas en si la sunon, la lunon kaj ĉiujn stelojn supre, kaj kovras ĉiujn estaĵojn malsupre. La tero, kiu nun sterniĝas antaŭ ni, estas ne pli ol la amasiĝo de manpleno da tero, sed, je sia vasteco, ĝi subtenas la altegan monton Huashan sen penado, entenas la Flavan Riveron kaj la maron sen superfluado, kaj portas ĉiujn estaĵojn. La monto, kiu nun staras antaŭ ni, estas ne pli ol la amasiĝo de pecoj da ŝtonoj, sed, je sia grandegeco, plantoj kreskas sur ĝi, bestoj vivas sur ĝi, kaj valoraj mineraloj povas esti elfositaj. La maro, kiu nun etendiĝas antaŭ ni, estas ne pli ol kulero da akvo, sed, je sia nesondebleco, en ĝi vivas diversaj specoj de testudoj, aligatoroj, drakoj kaj fiŝoj kaj el ĝi produktiĝas diversaj akvaj riĉaĵoj.

天地之道，可一言而尽也：其为物不贰，则其生物不测。天地之道：博也，厚也，高也，明也，悠也，久也。今夫天，斯昭昭之多，及其无穷也，日月星辰系焉，万物覆焉。今夫地，一撮土之多，及其广厚，载华岳而不重，振河海而不泄，万物载焉。今夫山，一卷石之多，及其广大，草木生之，禽兽居之，宝藏兴焉。今夫水，一勺之多，及其不测，鼋鼉、蛟龙、鱼鳖生焉，货财殖焉。

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Perfekta kaj senfina estas la volo de la Ĉielo!” Tio klarigas la kaŭzon, kial la Ĉielo estas Ĉielo. Estas dirite en ĝi ankaŭ: “Kiel glora estas la pura karaktero de la reĝo Wen!” Tio klarigas la kaŭzon, kial li ricevis la postmortan titolon “Wen”, kiu signifas “rafinitan”. La neriproĉebla senmakuleco de lia karaktero brilos tiel senfine, kiel la naturo de la Ĉielo.

诗云：“维天之命，于穆不已！”盖曰天之所以为天也。“于乎不显！文王之德之纯！”盖曰文王之所以为文也，纯亦不已。

*La supra estas la dudeksesa ĉapitro.*

*右第二十六章。*

## §27

Kiel granda estas la principo de la saĝula konduto! Ĝi estas tiel abunda kaj tiel potenca, kiel la akvo, kiu nutras kaj prosperigas ĉiujn estaĵojn, kaj tiel sublima, kiel la ĉielo. Ĝi estas tiel kompleta kaj ampleksa, ke ĝi entenas tri cent ceremoniajn regulojn kaj tri mil kondutajn regulojn. Ĝi regas nur post la apero de la ĝusta homo. Sekve oni diras, ke la plej perfekta principo de la konduto ne povas esti formita sen la homo de plej alta moraleco. Tial la homo de alta moraleco rigardas valora sian virtan naturon, kaj estas diligenta en sia studado, tiel ke li havas erudicion vastan kaj profundan. Sekvante la doktrinon de mezeco li atingas la plej subliman kaj brilan regnon de penso; relernante malnovajn sciojn, li akiras novajn; li estas honesta kaj sincera, kaj observas la etiketojn. Sekve li ne estas ordonema tiam, kiam li okupas superan pozicion, kaj ne estas malobeema tiam, kiam li okupas malsuperan pozicion. Li esprimas siajn politikajn opiniojn

por ricevi nomumiĝon al iu ofico tiam, kiam la regno estas bone regata; li restas silenta kaj trudas al si sindetenadon tiam, kiam la regno estas malbone regata. Tio signifas la samon, kiel kio estas dirita en *Libro de Poezio*: “Estu saĝa kaj singarda, por protekti vin kontraŭ ebla danĝero.”

大哉圣人之道！洋洋乎！发育万物，峻极于天。优优大哉！礼仪三百，威仪三千。待其人而后行。故曰苟不至德，至道不凝焉。故君子尊德性而道问学，致广大而尽精微，极高明而道中庸。温故而知新，敦厚以崇礼。是故居上不骄，为下不倍，国有道其言足以兴，国无道其默足以容。诗曰“既明且哲，以保其身”，其此之谓与！

*La supra estas la dudeksepa ĉapitro.*

*右第二十七章。*

## §28

Konfuceo diris: “Katastrofo minacas okazi al tiu, kiu estas senscia kaj tamen tromemfida, malaltranga kaj tamen arbitrema, kaj vivas en la nuna mondo kaj tamen persistas en la restarigo de la antikva sistemo.”

子曰：“愚而好自用，贱而好自专，生乎今之世，反古之道。如此者，灾及其身者也。”

Tiu, kiu ne estas la Filo de la Ĉielo, ne devus fiksi ritojn, nek doni leĝojn kaj moralajn normojn, nek studi kaj ekzameni la komune uzatajn ideografiaĵojn. En la nuna tempo, oni havas la samajn veturilajn ŝpurojn, uzas la samajn ideografiaĵojn kaj sekvas la saman etikan kodon. Se iu okupas la pozicion de la Filo de la Ĉielo, sed al li mankas alta moraleco, li ne kuraĝas starigi la ritan kaj muzikan sistemojn. Se iu havas altan moralecon, sed al li mankas la rango de la Filo de la Ĉielo, li same ne kuraĝas starigi la ritan kaj muzikan sistemojn.

非天子，不议礼，不制度，不考文。今天下车同轨，书同文，行同伦。虽有其位，苟无其德，不敢作礼乐焉；虽有其德，苟无其位，亦不敢作礼乐焉。

Konfuceo diris: “Mi povas interpreti la ritojn de la dinastio Xia, sed la ritoj de la regno Qi, kiu estis fondita de la posteuloj de dinastio Xia, ne servis kiel ekzemplo. Mi studas la ritojn de la dinastio Yin, kiuj estis konservataj en la regno Song, kiu estis fondita de la posteuloj de la dinastio Yin. Mi studas la ritojn de la dinastio Zhou, kiuj estas praktikataj en la nuna tempo, kaj kiujn mi observas.”

子曰：“吾说夏礼，杞不足征也；吾学殷礼，有宋存焉；吾学周礼，今用之，吾从周。”

*La supra estas la dudekoka ĉapitro.*

*右第二十八章。*

## §29

Fiksi ritojn, doni leĝojn kaj ekzameni la ideografiaĵojn estas la tri gravaj aferoj farendaj por la regado super la imperio. Tiuj, kiuj atingis la suverenecon de la imperio, havante la trion kompletigita, certe malofte kulpos erarojn en sia regado. Kvankam bona estas la etika kodo starigita de la suverenoj de la pasintaj dinastioj, tamen en la nuna tempo ĝi ankoraŭ ne estas atestita kiel praktikebla. Neatestita kiel praktikebla, ĝi ne trovos kredon

ĉe la popolo, kaj sekve la popolo ne observas ĝin. Kvankam bona estas la etika kodo starigita de iu en modesta situacio, tamen ĉar lia rango ne estas sufiĉe alta, la popolo ne kredas ĝin kaj sekve ne observas ĝin. Tial, kiam la reganto de regno starigas etikan kodon, li devas unue serioze praktiki ĝin, poste konfirmi ĝin per la popola praktikado kaj ekzameni ĝin kompare kun tiu de la tri reĝoj de la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou, por trovi ĝin tute senerara, tiel ke ĝi ne estos kontraŭ la normaleco en la universo, ke ĝi ne vekos suspekton tiam, kiam oni petos konsilojn de la supernaturaj estaĵoj, kaj ke ĝi ne estos dubinda ĉe la apero de alia saĝulo post cent generacioj. Ke ĝi ne vekos suspekton tiam, kiam oni petos konsilojn de la supernaturaj estaĵoj, tio montras, ke la reganto konas la volon de la Ĉielo; ke ĝi ne estos dubinda ĉe la apero de alia saĝulo post cent generacioj, tio montras, ke la reganto konas la sentojn de la homoj. Sekve la aktivecoj de la reganto estos sekvataj kiel ekzemploj de la estontaj generacioj, lia konduto starigos normojn por la estontaj generacioj, kaj liaj esprimitaj opinioj pri publikaj aferoj estos rigardataj kiel kriterioj de la estontaj generacioj. Tiuj, kiuj estas for de li, lin sopire respektas; kaj tiuj, kiuj estas proksime al li, estas neniel teditaj de li.

Estas dirite en *Libro de Poezio*:

“Nenia malŝato estas tie,  
Nek tedo estas ĉi tie;  
De tago al tago, de nokto al nokto,  
Eternas la laŭdoj de la popolo”

Neniam ja ekzistis reganto, kiu ne komprenis tion ĉi, povis akiri al si bonegan renomon ĉie sub la ĉielo.

王天下有三重焉，其寡过矣乎！上焉者虽善无征，无征不信，不信民弗从；下焉者虽善不尊，不尊不信，不信民弗从。故君子之道：本诸身，征诸庶民，考诸三王而不缪，建诸天地而不悖，质诸鬼神而无疑，百世以俟圣人而不惑。质诸鬼神而无疑，知天也；百世以俟圣人而不惑，知人也。是故君子动而世为天下道，行而世为天下法，言而世为天下则。远之则有望，近之则不厌。诗曰：“在彼无恶，在此无射；庶几夙夜，以永终誉！”君子未有不如此而蚤有誉于天下者也。

*La supra estas la dudeknaŭa ĉapitro.*

*右第二十九章。*

## §30

Konfuceo sekvis la ekzemplojn de la antikvaj saĝuloj Yao kaj Shun kaj prenis la antikvajn reĝojn Wen kaj Wu kiel sian modelon. Li harmoniigis sin kun la ŝanĝiĝoj de la tempoj kaj konformigis sin kun la naturaj kondiĉoj kaj la sociaj kutimoj. Lia virto estas simila al la universo, kiu portas ĉiujn estaĵojn kaj kovras ĉiujn estaĵojn, kaj estas tiel natura, kiel la ŝanĝigoj de la sezonoj kaj la alterna brilado de la suno kaj la luno. Ĉiuj estaĵoj kune ekzistas sen fari malutilon unu al la alia, ĉiuj leĝoj kune funkcias sen ia ajn kolizio inter si. Malgrandaj virtoj estas kiel riveroj, kiuj nutras la estaĵojn en siaj valoj; grandaj virtoj estas kiel la vasta tero, sur kiu prosperas ĉiuj estaĵoj. Jen kial la Ĉielo kaj la Tero estas tiel grandaj.

仲尼祖述尧舜，宪章文武；上律天时，下袭水土。辟如天地之无不持载，无不覆帔，辟

如四时之错行，如日月之代明。万物并育而不相害，道并行而不相悖，小德川流，大德敦化，此天地之所以为大也。

*La supra estas la trideka ĉapitro.*

右第三十章。

## §31

Nur la plej sankta homo povas esti sufiĉe saĝa kaj erudicia, por regi super la mondo; sufiĉe grandanima kaj milda, por ampleksi ĉiujn estaĵojn; sufiĉe persistema kaj rezoluta, por decidi pri gravaj demandoj; sufiĉe serioza kaj impona, por inspiri al aliaj respekton; sufiĉe klarmensa kaj precizema, por distingi la ĝustan de la malĝusta.

唯天下至圣，为能聪明睿知，足以有临也；宽裕温柔，足以有容也；发强刚毅，足以有执也；齐庄中正，足以有敬也；文理密察，足以有别也。

Lia virto estas vasta kaj profunda, kaj manifestiĝas en ĉiu momento. Ĝi estas tiel vasta, kiel la ĉielo, tiel profunda, kiel la abismo. Neniu el la popolanoj povas lin ne respekti, neniu el la popolanoj povas ne kredi, kion ajn li diras, kaj neniu el la popolanoj povas ne trovi plezuron en ĉio, kion li faras. Lia bona reputacio disvastiĝas ĉie en la Meza Imperio kaj etendiĝas al ĉiuj distriktoj de la barbaraj triboj. En la lokoj, kie ter- kaj akvo-veturiloj iras kaj homoj vojaĝas, en la lokoj, kiujn la ĉielo kovras kaj la tero subtenas, en la lokoj, kie brilas la suno kaj la luno, kaj en la lokoj, kiujn humidigas la prujno kaj la roso; — ĉiuj, kiuj havas sangon kaj spiron, lin sincere honoras kaj amas, kaj tial oni diras, ke li povas esti egala al la Ĉielo.

溥博渊泉，而时出之。溥博如天，渊泉如渊。见而民莫不敬，言而民莫不信，行而民莫不说。是以声名洋溢乎中国，施及蛮貊；舟车所至，人力所通；天之所覆，地之所载，日月所照，霜露所队；凡有血气者，莫不尊亲，故曰配天。

*La supra estas la tridekunua ĉapitro.*

右第三十一章。

## §32

Nur la plej sincera homo povas subteni kaj ĝustigi la fundamentajn interhomajn rilatojn, starigi kaj nutri la fundamentan virton de la homaro, kaj koni la disvolviĝon kaj la transformiĝadon de la universo. Sur kio do li sin apogas tiam, kiam li faras tion ĉion? Nur sur siaj sincereco kaj humaneco, kiuj estas tiel profundaj, kiel la abismo, kaj tiel vastaj, kiel la ĉielo. Krom tiu, kiu posedas veran ĉiosciadon kaj perfektan virton, kiel do iu ajn alia povus kompreni ĉion ĉi tion?

唯天下至诚，为能经纶天下之大经，立天下之大本，知天地之化育。夫焉有所倚？肫肫其仁！渊渊其渊！浩浩其天！苟不固聪明圣知达天德者，其孰能知之？

*La supra estas la tridekdua ĉapitro.*

右第三十二章。

## §33

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kovru vian brokitan robon per supertuto.” Tio montras la malŝaton al la frapanta troeleganteco. Tial la noblulo kutime preferas kaŝi sian virton, dume ĝi fariĝas pli klare vidata kun ĉiu tago. La malnoblulo penas sin famigi, dume li fariĝas pli abomena kun ĉiu tago, kio kondukas lin al ruiniĝo. La maniero, en kiu la noblulo kondutas, estas plata kaj tamen ne teda, simpla kaj tamen gracia, milda kaj tamen bonorda; kaj li kapablas ekscii alian punkton pere de la punkto videbla, vidi la internon el la ekstero, antaŭvidi la estontan disvolviĝon laŭ la unuaj indicoj. Se iu povas konduki en tia maniero, li certe jam eniras en la virton.

诗曰“衣锦尚絺”，恶其文之着也。故君子之道，闇然而日章；小人之道，的然而日亡。君子之道：淡而不厌，简而文，温而理，知远之近，知风之自，知微之显，可与入德矣。

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kvankam la fiŝo sinkas kaj kuŝas sur la fundo, ĝi tamen estas klare vidata.” Kiam noblulo ekzamenas sian konsciencon, li havas nenion por bedaŭri kaj trovas nenion, kiu malbriligus liajn aspirojn. Tio, per kio la noblulo superas aliajn, estas nur, ke li kondutas singarde eĉ tiam, kiam li estas for de alies vido.

诗云：“潜虽伏矣，亦孔之昭！”故君子内省不疚，无恶于志。君子之所不可及者，其唯人之所不见乎。

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kiam vi estas sola en via ĉambro, vi ankoraŭ devas fari nenion, kio kaŭzus skrupulon dum memekzameno. La noblulo havas la senton de respekto eĉ tiam, kiam li estas en senagado, kaj havas la senton de sincereco eĉ tiam, kiam li diras nenion.

诗云：“相在尔室，尚不愧于屋漏。”故君子不动而敬，不言而信。

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “En silento farita oferado kaŭzas nenian disputon.” Tial la reganto de regno povas volontigi la popolon fari sian plejebulon, eĉ se li donas nenian rekompencan, kaj teni ilin en pli granda timo, ol per ekzekutista hakilo kaj batalhakilo, eĉ se li montras nenian koleron.

诗曰：“奏假无言，时靡有争。”是故君子不赏而民劝，不怒而民威于鈇钺。

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kiam la monarko elmontras sian virton, ĉiuj feŭdaj dukoj kaj princoj sekvas lian ekzemplon.” Tial, se la noblulo, kiu tenas la regadon, estas honesta, sincera kaj respektoplena, tiam paco regos sub la ĉielo.

诗曰：“不显惟德！百辟其刑之。”是故君子笃恭而天下平。

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kun nobla karaktero, mi ne bezonas esti severa en la voĉo kaj en la mieno.” Konfuceo diris: “Estas malplej dezirinde kulturi homojn per severa voĉo kaj severa mieno.”

诗云：“予怀明德，不大声以色。”子曰：“声色之于以化民，末也。”

Estas dirite en *Libro de Poezio*: “Kulturi homojn per sia virto estas tiel facile, kiel levi plumon.” Kvankam la plumo estas malpeza kaj malgranda, ĝi tamen havas sian kompareblaĵon rilate la grandecon, sed “la Ĉielo plenumas ĉion sensone kaj senpostsigne.” — Jen la perfekta virto.

诗曰：“德輶如毛”，毛犹有伦。“上天之载，无声无臭”，至矣！

*La supra estas la tridektria ĉapitro. Zisi, kondukinte siajn eksplikojn ĝis la plej ekstrema grado en la antaŭaj ĉapitroj, returniĝas kun ekzameno en tiu ĉi ĉapitro al la origino de sia temo; kaj poste, denove ekde la konduto de la lernanto, libera de ĉia egoismo kaj singarda eĉ en sia*



soleco, li daŭrigas sian eksplikon, ĝis pri la trankviligo de la tuta imperio per la rimedo de simpla kaj sincera respekto. Fine li laŭdis ĝian misterecon, priskribante ĝin kiel senonan kaj senpostsignan. Li ĉi tie resumas sian tutan Verkon en konciza maniero. Kun sentoj plej profundaj kaj sinceraj, denove kaj refoje li admonas kaj instruas homojn: — ĉu do la lernanto povus ne fari sian plejblon en sia studado de tiu ĉi Verko?

右第三十三章。子思因前章极致之言，反求其本，复自下学为己谨独之事，推而言之，以驯致乎笃恭而天下平之盛。又赞其妙，至于无声无臭而后已焉。盖举一篇之要而约言之，其反复丁宁示人之意，至深切矣，学者其可不尽心乎！

## APENDICO

### Saĝaj vortoj el La Doktrino De Mezeco

出自《中庸》的经典名句（已收入拙编《中华汉世语典》）

【博厚，所以载物也；高明，所以覆物也；悠久，所以成物也】 [bó hòu, suǒ yǐ zǎi wù yě; gāo míng, suǒ yǐ fù wù yě; yōu jiǔ, suǒ yǐ chéng wù yě] vasta kaj profunda, ĝi (la ekstrema sincereco) portas ĉiujn estaĵojn sub la ĉielo; alta kaj brila, ĝi kovras ĉiujn estaĵojn sub la ĉielo; longe daŭranta, ĝi perfektigas ĉiujn estaĵojn sub la ĉielo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【博学之，审问之，慎思之，明辨之，笃行之】 [bó xué zhī, shěn wèn zhī, shèn sī zhī, míng biàn zhī, dǔ xíng zhī] oni devas vaste studi, detale demandadi, zorge pripensi, klare distingi kaj serioze praktiki (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【不偏之谓中，不易之谓庸；中者，天下之正道，庸者，天下之定理】 [bù piān zhī wèi zhōng, bù yì zhī wèi yōng; zhōng zhě, tiān xià zhī zhèng dào, yōng zhě, tiān xià zhī dìng lǐ] resti sen inklino al la du flankoj estas nomata “zhong”; allasi nenian ŝanĝiĝon estas nomata “yong”; “Zhong” signifas la ĝustan vojon sekvendan de ĉiuj homoj sub la ĉielo; “yong” signifas la fiksan principon reguligantan ĉion sub la ĉielo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【诚身有道：不明乎善，不诚乎身矣】 [chéng shēn yǒu dào: bú míng hū shàn, bú chéng hū shēn yǐ] ekzistas metodo por fari sin sincera, t.e. scii havi klaran nocion pri kio estas bona; alie oni ne estas sincera (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【诚者，非自成己而已也，所以成物也】 [chéng zhě, fēi zì chéng jǐ ér yǐ yě, suǒ yǐ chéng wù yě] per la sincereco la noblulo povas perfektigi pli ol sin mem: li povas perfektigi ĉiujn estaĵojn (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【诚之者，择善而固执之者也】 [chéng zhī zhě, zé shàn ér gù zhí zhī zhě yě] koncerne la ordinarajn homojn, ili devas fari elekton kaj firme sin teni je kio estas ĝusta (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【大德必得其位，必得其禄，必得其名，必得其寿】 [dà dé bì dé qí wèi, bì dé qí lù, bì dé qí míng, bì dé qí shòu] havante grandan virton, oni nepre devas posedi sian dignon, sian riĉecon, sian altan salajron, sian bonan reputacion kaj sian longvivecon (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【道不远人，人之为道而远人，不可以为道】 [dào bú yuǎn rén, rén zhī wéi dào ér yuǎn rén, bú

**kě yǐ wéi dào**] la doktrino de la mezeco sin distancigas de neniu persono; se iu, kiu sekvas la doktrinon, faras ĝin nealirebla por aliaj, tiam tio, kion li sekvas, neniel plu estas la doktrino de la mezeco (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【道也者，不可须臾离也；可离，非道也】 **[dào yě zhě, bù kě xū yú lí yě; kě lí, fēi dào yě]** oni neniam forlasas la vojon de la devo eĉ dum momento, kaj se ĝi povus esti forlasita, ĝi ne povus esti nomata tia (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【凡事豫则立，不豫则废；言前定则不跲，事前定则不困，行前定则不疚，道前定则不穷】 **[fán shì yù zé lì, bù yù zé fèi; yán qián dìng zé bú jí, shì qián dìng zé bú kùn, xíng qián dìng zé bú jiù, dào qián dìng zé bú qióng]** prepariteco certigas sukceson, dum neprepariteco kaŭzas malsukceson; kun antaŭpenso pri siaj vortoj dirotaj oni povas eviti subitan parolhalton; kun antaŭpenso pri aperonta problemo oni povas eviti frustrigon; kun antaŭpenso pri sia ago farota oni povas eviti erarojn; kun antaŭpenso pri sia kondukprincipo sekvota oni povas eviti venon en senelirejon (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【苟不至德，至道不凝焉】 **[gǒu bú zhì dé, zhì dào bú níng yān]** la plej perfekta principo de la konduto ne povas esti formita sen la homo de plej alta moraleco (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【国家将兴，必有祲祥；国家将亡，必有妖孽】 **[guó jiā jiāng xìng, bì yǒu zhēn xiáng, guó jiā jiāng wáng, bì yǒu yāo niè]** bonaj antaŭsignoj estas vidataj tiam, kiam la lando iras al prospero, kaj ankaŭ malbonaj antaŭsignoj estas vidataj tiam, kiam la lando iras al dekadenco / kiam la lando estas prosperanta, certe aperas aŭguro bona; kiam ĝi estas pereanta, certe aperas aŭguro sinistra (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【国有道，其言足以兴；国无道，其默足以容】 **[guó yǒu dào, qí yán zú yǐ xìng; guó wú dào, qí mò zú yǐ róng]** li (la homo de alta moraleco) esprimas siajn politikajn opiniojn por ricevi nomumiĝon al iu ofico tiam, kiam la regno estas bone regata; li restas silenta kaj trudas al si sindetenadon tiam, kiam la regno estas malbone regata / kiam la regno estas bone regata, liaj vortoj povas prosperigi la regnon; kiam la regno estas en malordo, lia silento povas savi al si la vivon (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【行险侥幸】 **[háng xiǎn jiǎo xìng]** atingi sukceson aŭ eviti malfeliĉon per hazardo [per bonŝanco] / lasi sian agon al la hazardo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*: la homo de malnobla karaktero ĉiam hazarde serĉas bonŝancajn okazojn aŭ evitas akcidentojn)

【好学近乎知，力行近乎仁，知耻近乎勇】 **[hào xué jìn hū zhī, lì xíng jìn hū rén, zhī chǐ jìn hū yǒng]** tiuj, kiuj amas lernadon, alproksimiĝas al la saĝeco; tiuj, kiuj persistas en bonfarado, alproksimiĝas al la humaneco; kaj tiuj, kiuj havas la hontosenton, alproksimiĝas al la kuraĝo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【或安而行之，或利而行之，或勉强而行之，及其成功，一也】 **[huò ān ér xíng zhī, huò lì ér xíng zhī, huò miǎn qiǎng ér xíng zhī, jí qí chéng gōng, yī yě]** oni praktikas la supre-diritaĵon (nome la grandaj normoj ĝenerale akceptitaj sub la ĉielo) kun malsamaj sintenoj; unuj kun trankvila konscienco, aliaj kun la deziro serĉi profiton, ankoraŭ aliaj kun nevolonteco, sed la rezultoj, kiujn la praktikado estigas sur homojn, estas la samaj (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【或生而知之，或学而知之，或困而知之，及其知之，一也】 **[huò shēng ér zhī zhī, huò xué ér zhī zhī, huò kùn ér zhī zhī, jí qí zhī zhī, yī yě]** unuj naskiĝas kun la scio pri la supre-diritaĵo, aliaj sciiĝas per lernado, kaj ankoraŭ aliaj akiras la sciojn per malfacila, eĉ dolora spertado, sed la rezultoj, kiujn la sciiĝo estigas sur homojn, estas la samaj (el la

klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【居上不骄，为下不倍；国有道，其言足以兴；国无道，其默足以容】 [jū shàng bú jiāo, wéi xià bú bèi; guó yǒu dào, qí yán zú yǐ xìng; guó wú dào, qí mò zú yǐ róng] li (la saĝulo) ne estas ordonema tiam, kiam li okupas superan pozicion, kaj ne estas malobeema tiam, kiam li okupas malsuperan pozicion; li esprimas siajn politikajn opiniojn por ricevi nomumiĝon al iu ofico tiam, kiam la regno estas bone regata; li restas silenta kaj trudas al si sindetenadon tiam, kiam la regno estas malbone regata (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子不动而敬，不言而信】 [jūn zǐ bú dòng ér jìng, bú yán ér xìn] la noblulo havas la senton de respekto eĉ tiam, kiam li estas en senagado, kaj havas la senton de sincereco eĉ tiam, kiam li diras nenion (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子笃恭而天下平】 [jūn zǐ dǔ gōng ér tiān xià píng] la noblulo havas la senton de respekto eĉ tiam, kiam li estas en senagado, kaj havas la senton de sincereco eĉ tiam, kiam li diras nenion (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子戒慎乎其所不睹，恐惧乎其所不闻】 [jūn zǐ jiè shèn hū qí suǒ bù dǔ, kǒng jù hū qí suǒ bù wén] la noblulo ĉiam estas diskreta kaj vigle atentema tiam, kiam li estas for de alies vido, kaj ankaŭ timema kaj singarda tiam, kiam li estas for de alies aŭdo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子居易以俟命，小人行险以侥幸】 [jūn zǐ jū yì yǐ sì mìng, xiǎo rén xíng xiǎn yǐ yáo xìng] la homo de nobla karaktero ĉiam restas en sia loko kun trankvileco atendante la volon de la Ĉielo, dum la homo de malnobla karaktero ĉiam hazarde serĉas bonŝancajn okazojn aŭ evitas akcidentojn (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子内省不疚，无恶于志】 [jūn zǐ nèi xǐng bú jiù, wú è yú zhì] kiam noblulo ekzamenas sian konsciencon, li havas nenion por bedaŭri kaj trovas nenion, kiu malbriligus liajn aspirojn (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子素其位而行，不愿乎其外】 [jūn zǐ sù qí wèi ér xíng, bú yuàn hū qí wài] la noblulo agas konforme al sia rango kaj deziras nenion, kio estas super lia situacio (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子无入而不自得焉】 [jūn zǐ wú rù ér bú zì dé yān] la noblulo scias resti kontenta pri sia loko, kian ajn pozicion li okupas (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子以人治人，改而止】 [jūn zǐ yǐ rén zhì rén, gǎi ér zhǐ] la monarko de regno devas regi super la popolo laŭ ilia individua naturo, en la maniero konvena al ili, kaj ĉesi entrudiĝi en ilian konduton tuj kiam iliaj eraroj estas korektitaj (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子语大，天下莫能载焉；语小，天下莫能破焉】 [jūn zǐ yǔ dà, tiān xià mò néng zǎi yān; yǔ xiǎo, tiān xià mò néng pò yān] la virto de altmoralaj homoj, pri kiu noblulo parolas, estas tiel granda, ke la universo apenaŭ povas ĝin enteni; ĝi estas ankaŭ tiel malgranda, ke nenio en la universo povas ĝin disfendi (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子之道，闇然而日章；小人之道，的然而日亡】 [jūn zǐ zhī dào, àn rán ér rì zhāng; xiǎo rén zhī dào, de rán ér rì wáng] la noblulo kutime preferas kaŝi sian virton, dume ĝi fariĝas pli klare vidata kun ĉiu tago; la malnoblulo penas sin famigi, dume li fariĝas pli abomena kun ĉiu tago, kio kondukas lin al ruiniĝo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子之道，辟如行远必自迩，辟如登高必自卑】 [jūn zǐ zhī dào, pì rú xíng yuǎn bì zì ěr, pì rú dēng gāo bì zì bēi] la praktikado de la kodo de la noblula konduto povas esti komparata kun la farado de longa vojaĝo, kiu devas komenciĝi de la tuj proksima punkto, aŭ kun la supreniro sur alton, kiu devas komenciĝi de la plej malalta tero (el la klasikaĵo *La*

*Doktrino de Mezeco)*

【君子之道，造端乎夫妇；及其至也，察乎天地】 [jūn zǐ zhī dào, zào duān hū fū fù; j íq ízh ì yě, chá hū tiān dì] la filozofio de la vivo, kiun la noblulo sekvas, komenciĝas en la manieroj de la ordinaraj viroj kaj virinoj, sed ĝia perfekta manifestiĝo hele brilas en la universo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子之道：淡而不厌，简而文，温而理，知远之近，知风之自，知微之显】 [jūn zǐ zhī dào: dàn ér bú yàn, jiǎn ér wén, wēn ér lǐ, zhī yuǎn zhī jìn, zhī fēng zhī zì, zhī wēi zhī xiǎn] la maniero, en kiu la noblulo kondutas, estas plata kaj tamen ne teda, simpla kaj tamen gracia, milda kaj tamen bonorda; kaj li kapablas ekscii alian punkton pere de la punkto videbla, vidi la internon el la ekstero, antaŭvidi la estontan disvolviĝon laŭ la unuaj indicoj (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子中庸，小人反中庸；君子之中庸也，君子而时中，小人之反中庸也，小人而无忌惮也】 [jūn zǐ zhōng yōng, xiǎo rén fǎn zhōng yōng; jūn zǐ zhī zhōng yōng yě, jūn zǐ ér shí zhōng, xiǎo rén zhī fǎn zhōng yōng yě, xiǎo rén ér wú jì dàn yě] la noblulo parolas kaj kondutas laŭ la doktrino de la mezeco, dum la malnoblulo parolas kaj kondutas kontraŭ tiu doktrino; la noblulo observas la doktrinon de la mezeco, ĉar lia alta moraleco ebligas al li ĉiam aĝi konforme al la moralaj normoj; la malnoblulo malobservas la doktrinon de la mezeco, ĉar lia degenerinta moraleco kaŭzas, ke li agu senskrupule (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【君子尊德性而道问学，致广大而尽精微】 [jūn zǐ zūn dé xìng ér dào wèn xué, zhì guǎng dà ér jìn jīng wēi] la homo de alta moraleco rigardas valora sian virtan naturon, kaj estas diligenta en sia studado, tiel ke li havas erudicion vastan kaj profundan (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【溥博渊泉，而时出之；溥博如天，渊泉如渊】 [pǔ bó yuān quán, ér shí chū zhī; pǔ bó rú tiān, yuān quán rú yuān] la virto (de la plej sankta homo) estas vasta kaj profunda, kaj manifestiĝas en ĉiu momento; ĝi estas tiel vasta, kiel la ĉielo, tiel profunda, kiel la abismo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【其人存，则其政举；其人亡，则其政息】 [q ír én cún, zé q ízh èng jǔ; q ír én w áng, zé q ízh èng xī] kiam la saĝaj monarkoj kaj la virtaj ministroj vivis, iliaj dekretoj de la reĝoj povis esti aplikitaj; kiam tiaj monarkoj kaj ministroj ne plu vivis, tiuj dekretoj estus nuligitaj (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*) — 参见 “人存政举，人亡政息”

【人道敏政，地道敏树】 [r én dào mǐn zh èng, dì dào mǐn shù] por elekti la ĝustajn personojn oni devas esti lerta en la distingo kaj uzo de tiuj, kiuj estas diligentaj en la servado al la regno; por utiligi la teron oni devas plantadi arbojn kaj arbustojn (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【人一能之，己百之；人十能之，己千之；果能此道矣，虽愚必明，虽柔必强】 [rén yī néng zhī, jǐ bǎi zhī; rén shí néng zhī, jǐ qiān zhī; guǒ néng cǐ dào yǐ, suī yú bì míng, suī róu bì qí áng] se aliaj sukcesas per unu fojo, mi penados cent fojojn ĝis mi atingos la sukceson; se aliaj sukcesas per dek fojoj, mi penados mil fojojn! se tia penado estos efektive farita, la malsaĝa certe fariĝos inteligenta, kaj la malforta certe fariĝos forta (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【上不怨天，下不尤人】 [shàng bù yuàn tiān, xià bù yóu rén] li ne plendas kontraŭ la Ĉielo tiam, kiam li levas sian rigardon supren, nek riproĉas homojn tiam, kiam li mallevas la rigardon malsupren (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【施诸己而不愿，亦勿施于人】 [shī zhū jǐ ér bù yuàn, yì wù shī yú rén] tio, kion vi ne volus,

ke aliaj faru al vi, ne devus esti farita al ili (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【素富贵，行乎富贵；素贫贱，行乎贫贱】 [sù fù guì, xíng hū fù guì; sù pín jiàn, xíng hū pín jiàn] se oni estas riĉa kaj okupas altan rangon, oni faras tion, kio estas konvena al la pozicio de riĉulo kaj altrangulo; se oni estas malriĉa kaj okupas malaltan rangon, oni faras tion, kio estas konvena al la pozicio de malriĉulo kaj malaltrangujo — oni devas esti kontenta pri sia loko, kian ajn pozicion oni okupas (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【素患难，行乎患难】 [sù huàn nán, xíng hū huàn nán] se oni estas en mizero, oni faras, kion la mizerulo devas fari — oni devas esti kontenta pri sia loko kaj fari nur tion, kio estas konvena al sia pozicio (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【天地之道，可一言而尽也；其为物不贰，则其生物不测】 [tiān dì zhī dào, kě yī yán ér jìn yě; qí wéi wù bú èr, zé qí shēng wù bú cè] la naturo de la Ĉielo kaj la Tero povas esti prezentata per unu frazo: ĉar ili estas konstantaj en sia sincereco, ilia maniero perfektigi ĉiujn estaĵojn estas senfine subtila (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【天地之道：博也，厚也，高也，明也，悠也，久也】 [tiān dì zhī dào: bó yě, hòu yě, gāo yě, míng yě, yōu yě, jiǔ yě] la naturo de la Ĉielo kaj la Tero estas vasta, profunda, alta, brila, konstanta, kaj ĉiam daŭranta (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【天地之无不持载，无不覆帔，如四时之错行，如日月之代明】 [tiān dì zhī wú bú chí zǎi, wú bú fù pī, rú sì shí zhī cuò xíng, rú rì yuè zhī dài míng] la virto (de Yao kaj Shun) estas simila al la universo, kiu portas ĉiujn estaĵojn kaj kovras ĉiujn estaĵojn, kaj estas tiel natura, kiel la ŝanĝigoj de la sezonoj kaj la alterna brilado de la suno kaj la luno (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【天命之谓性，率性之谓道，修道之谓教】 [tiān mìng zhī wèi xìng, lǜ xìng zhī wèi dào, xiū dào zhī wèi jiāo] tio, per kio la homo estas dotita de la Ĉielo, estas nomata la naturo; la sekvado de tiu naturo estas nomata la vojo de la devo; la reguligo de la vojo estas nomata instruado (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【天之生物，必因其材而笃焉；故栽者培之，倾者覆之】 [tiān zhī shēng wù, bì yīn qí cái ér dǔ yān; gù zāi zhě péi zhī, qīng zhě fù zhī] la Ĉielo kreas ĉiujn estaĵojn en la universo kaj traktas ĉiun el ili en la maniero konvena al ties naturo, kulturante la kultureblajn kaj lasante fali la ŝanceliĝantajn (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【为政在人，取人以身，修身以道，修道以仁】 [wéi zhèng zài rén, qǔ rén yǐ shēn, xiū shēn yǐ dào, xiū dào yǐ rén] la lerteco de la regna regado kuŝas en la akiro de la virtaj kapabluloj, kaj tiaj personoj povas esti akiritaj dank' al la kulturita karaktero de la reganto; por bone kulturi sin mem, la reganto devas agi laŭ la normoj ĝenerale akceptitaj sub la ĉielo; por agi laŭ la normoj ĝenerale akceptitaj sub la ĉielo, li devas sekvi la principon de la humaneco (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【唯天下至诚，为能尽其性，能尽其性，则能尽人之性；能尽人之性，则能尽物之性；能尽物之性，则可以赞天地之化育；可以赞天地之化育，则可以与天地参矣】 [wéi tiān xià zhì chéng, wéi néng jìn qí xìng, néng jìn qí xìng, zé néng jìn rén zhī xìng; néng jìn rén zhī xìng, zé néng jìn wù zhī xìng; néng jìn wù zhī xìng, zé kě yǐ zàn tiān dì zhī huà yù; kě yǐ zàn tiān dì zhī huà yù, zé kě yǐ yǔ tiān dì cān yǐ] nur la saĝulo, kiu estas la plej sincera, povas disvolvi sian propran naturon ĝis la perfekteco; kiam li kapablas plene disvolvi sian propran naturon, li povas fari la samon al la naturo de la amasoj; kiam li kapablas plene disvolvi la naturon de la amasoj, li povas fari la samon al la naturo de ĉiuj estaĵoj sub la ĉielo; kiam li kapablas plene disvolvi la naturon de ĉiuj estaĵoj sub la ĉielo, li povas helpi al la Ĉielo kaj la

Tero kreskigi kaj nutri ĉiujn estaĵojn; kiam li kapablas helpi al la Ĉielo kaj la Tero kreskigi kaj nutri ĉiujn estaĵojn, tiam li povas stari flanko ĉe flanko kun la Ĉielo kaj la Tero (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【温故而知新，敦厚以崇礼】 [wēn gù ér zhī xīn, dūn hòu yǐ chóng lǐ] relernante malnovajn sciojn, oni akiras novajn; oni estas honesta kaj sincera, kaj observas la etiketojn (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【文武之政，布在方策；其人存，则其政举；其人亡，则其政息】 [wén wǔ zhī zhèng, bù zài fāng cè; qí rén cún, zé qí zhèng jǔ; qí rén wáng, zé qí zhèng xī] la dekretoj de la reĝoj Wen kaj Wu de la dinastio Zhou pri la regado estis metitaj en la kodojn kaj registrojn; kun la saĝaj monarkoj kaj la virtaj ministroj, la dekretoj de la reĝoj Wen kaj Wu povis esti aplikitaj; sen tiaj monarkoj kaj ministroj, tiuj dekretoj estus nuligitaj (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【喜怒哀乐之未发，谓之中；发而皆中节，谓之和；中也者，天下之大本也，和也者，天下之达道也】 [xǐ nù āi lè zhī wèi fā, wèi zhī zhōng; fā ér jiē zhōng jiē, wèi zhī hé; zhōng yě zhě, tiān xià zhī dà běn yě, hé yě zhě, tiān xià zhī dá dào yě] kiam la ĝojo, la kolero, la malĝojo kaj la feliĉo estas tenataj en la homa koro, tiam ili estas en la stato de la mezeco; kiam ili estas esprimitaj konforme al la moralaj normoj, tiam ili estas en la stato de harmonio; la mezeco estas la fundamento de ĉio sub la ĉielo, kaj la harmonio estas la universala leĝo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【信乎朋友有道：不顺乎亲，不信乎朋友矣；顺乎亲有道：反诸身不诚，不顺乎亲矣；诚身有道：不明乎善，不诚乎身矣】 [xìn hū péng yǒu yǒu dào: bú shùn hū qīn, bú xìn hū péng yǒu yǐ; shùn hū qīn yǒu dào: fǎn zhū shēn bú chéng, bú shùn hū qīn yǐ; chéng shēn yǒu dào: bú míng hū shàn, bú chéng hū shēn yǐ] ekzistas maniero por akiri la fidon de siaj amikoj: oni ne povas esti fidata de siaj amikoj, se oni ne estas obeema al siaj gepatroj; ekzistas maniero por esti obeema al siaj gepatroj: oni ne povas esti obeema al siaj gepatroj, se oni ne estas sincera; ekzistas maniero por esti sincera: oni ne povas esti sincera, se oni ne scias, kio estas bona (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【言顾行，行顾言】 [yán gù xíng, xíng gù yán] oni devas pensi pri siaj agoj tiam, kiam oni parolas, kaj oni devas pensi pri siaj vortoj tiam, kiam oni agas (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【愚而好自用，贱而好自专，生乎今之世，反古之道：如此者，灾及其身者也】 [yú ér hào zì yòng, jiàn ér hào zì zhuān, shēng hū jīn zhī shì, fǎn gǔ zhī dào: rú cǐ zhě, zāi jí qí shēn zhě yě] katastrofo minacas okazi al tiu, kiu estas senscia kaj tamen tromemfida, malaltranga kaj tamen arbitrema, kaj vivas en la nuna mondo kaj tamen persistas en la restarigo de la antikva sistemo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【在上位，不陵下；在下位，不援上】 [zài shàng wèi, bù líng xià; zài xià wèi, bù yuán shàng] kiam li okupas altan pozicion, li traktas malestime aŭ krude neniun, kiu estas malsupera al li; kiam li okupas malaltan pozicion, li humiliĝas al neniuj, kiu estas supera al li (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【正己而不求人，则无怨】 [zhèng jǐ ér bù qiú yú rén, zé wú yuàn] ĉar li ĉiam honestigas sian konduton kaj neniam metas troajn postulojn al aliaj, li nutras en si nenian rankoron kontraŭ ili (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)

【知耻近乎勇】 [zhī chǐ jìn hū yǒng] tiu, kiu havas hontosenton, estas proksima al kuraĝo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*) / kiu sentas honton, proksimas al kuraĝo

- 【知仁勇三者，天下之达德也，所以行之者一也】 [zhī rén yǒng sān zhě, tiān xià zhī dá dé yě, suǒ yǐ xíng zhī zhě yī yě] la tri specoj de morala karaktero, nome la saĝeco, bonkoreco kaj kuraĝo, estas universale respektataj sub la ĉielo, kaj la kondiĉoj necesaj por praktiki tian moralan karakteron, estas la samaj (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)
- 【知所以修身，则知所以治人；知所以治人，则知所以治天下国家矣】 [zhī suǒ yǐ xiū shēn, zé zhī suǒ yǐ zhì rén; zhī suǒ yǐ zhì rén, zé zhī suǒ yǐ zhì tiān xià guó jiā yǐ] kiam oni scias plialtigi sian kulturitecon, oni scias regi super la popolo; kiam oni scias administri la aferojn de la popolo, oni scias regi la imperion kun ĉiuj ĝiaj regnoj kaj familioj (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)
- 【执两用中】 [zhī liǎng yòng zhōng] sin teni je la ĝusta mezo — montri senpartiecon [esti justa] (en traktado de aferoj) / fari nek eksceson [troon], nek maleksceson [maltroon] (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*: ĉio, kion li faris, estis bazita sur la mezeco, kiun li akiris el la du ekstremoj diametre kontraŭaj; tio klarigas, kial li estis estimata kiel Shun)
- 【致中和，天地位焉，万物育焉】 [zhì zhōng hé, tiān dì wèi yān, wàn wù yù yān] kun la mezeco kaj la harmonio la tero moviĝas en ordo, kaj ĉio sur ĝi kreskas kaj prosperas (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)
- 【中也者，天下之大本也；和也者，天下之达道也】 [zhōng yě zhě, tiān xià zhī dà běn yě; hé yě zhě, tiān xià zhī dá dào yě] la mezeco estas la fundamento de ĉio sub la ĉielo, kaj la harmonio estas la universala leĝo (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)
- 【忠恕违道不远，施诸己而不愿，亦勿施于人】 [zhōng shù wéi dào bù yuǎn, shī zhū jǐ ér bù yuàn, yì wù shī yú rén] oni alproksimiĝas al la doktrino de la mezeco tiam, kiam oni estas fidela kaj indulgema al aliaj; tio, kion vi ne volus, ke aliaj faru al vi, ne devus esti farita al ili (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)
- 【自诚明，谓之性；自明诚，谓之教；诚则明矣，明则诚矣】 [zì chéng míng, wèi zhī xìng; zì míng chéng, wèi zhī jiāo; chéng zé míng yǐ, míng zé chéng yǐ] la akrevida inteligenteco en la distingado de aferoj, kiu rezultas el la sincereco en la plej interna koro, estas kunnaskita naturo; la sincereco en la plej interna koro, kiu rezultas el la akrevida inteligenteco en la distingado de aferoj, estas atribuita al la edifado; kiam oni estas sincera en sia plej interna koro, oni povas esti tre akrevida en la distingado de aferoj; kaj kiam oni estas akrevida en la distingado de aferoj, oni povas esti tre sincera en sia plej interna koro (el la klasikaĵo *La Doktrino de Mezeco*)